



EL POPOLA ĈINIO

Vortoj de Prezidanto Maŭ

La partiaj organizoj devas konsisti el progresemaj elementoj de la proletaro kaj esti vigleplenaj avangardaj organizoj, kiuj kapablas gvidi la proletaron kaj revoluciajn amasojn en batalo kontraŭ la klasaj malamikoj.



Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima bata
Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio. E



amiko Vicprezidanto Lin Biaŭ en la 12-a
n tiu sesio Prezidanto Maŭ faris ekstreme

Ŝtala Heroo

Ĝang Juĉun

Estis la 9-a de oktobro de 1968.

En la ŝtalfandejo de la ŝtalfabriko de la Benhi-a Ferŝtala Kompanio, ardis la fajro en la fornego kaj disen sinĵetis ŝtalaj fajreroj. Kun heroa revolucia entuziasmo la laboristoj faris streĉan batalon de ŝtalfandado.

En tiu tempo, sur la fornego, metala elektrodo peza je pli ol 300 kilogramoj subite defalis, kaj estis videble, ke tuj okazos terura akcidento. Antaŭ la elektrodo estis kristaligujo plena de flu-ida ŝtalo. Se la elektrodo frapiĝos sur la kristaligujo, la lasta tuj eksplodos. Dekstre de la elektrodo estis akvoproviza ekipaĵo kaj komutilaro, se la elektrodo frapiĝos sur ilin, la provizado de akvo kaj elektro tuj ĉesos. Dekstre antaŭ la elektrodo laboris klasaj fratoj, se la elektrodo falos tiu-direkte, la vivo de la lastaj troviĝos en danĝero. En tiu kriza momento la ŝtala laboristo Ĝang Juĉun sin ĵetis al la elektrodo kaj per tuta forto brakumis ĝin. La elektrodo glitfalas de sur lia korpo al sekura loko, tiel ke la ŝtata posedaĵo kaj la vivo de klasaj fratoj estis sekurigitaj, tamen pro tro serioza vundo Ĝang Juĉun oferis sian vivon por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

En 1952, kun heroa volo partopreni la industrian konstruadon de la patrolando Ĝang Juĉun venis al la fabriko, li tre emociiĝis, ke li, multe suferinta en la malnova socio dum infaneco, nun povis fariĝi ŝtala laboristo en la nova Ĉinio. Li ofte diris al aliaj: "Prezidanto Maŭ estas granda savanto de ni malriĉuloj, kaj liaj bonfaroj estas pli altaj ol monto kaj pli profundaj ol maro, mi nepre revolucios tutan vivon sekvante Prezidanton Maŭ." Tamen, tiutempe la plenmano da reakciaj teknikaj "aŭtoritatuloj" de la fabriko senbride

disvastigis la absurdaĵojn "posedo de tekniko signifas eternan panon", "por fandi ŝtalon unue necesas posedi teknikon" kun la celo korupti la laboristojn per la burĝara ideologio. Sed Ĝang Juĉun, kiu senlime amas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, tre baldaŭ travidis la malican intencon de tiuj reakciaj teknikaj "aŭtoritatuloj". Li rememoris sian amaran pasintecon: Kiam li estis dekkelk-jara, por sin vivteni li laboregis kun sia patro tutjare por bienulo kaj ofte suferis batojn kaj insultojn, kvankam ili penis eĉ kun malplena stomako. Li pensis: Sub la gvido de Prezidanto Maŭ ni malriĉuloj liberiĝis; se ni sekvos lin, ni jam havos ĉion!

Ĝang Juĉun diris al siaj kunbatalantoj: Por fandi ŝtalon, ni unue devas forĝi nin mem, kaj por forĝi nin mem, ni devas forĝi al ni ruĝan koron fidelan al Prezidanto Maŭ!

De tiam Ĝang Juĉun konstante petis maljunajn laboristojn, kiuj suferis grandan amaron en la malnova socio kaj havas profundan malamon kontraŭ ĝi, rakonti siajn suferojn en la malnova socio en komparo kun la dolĉo de la nova socio, por fari pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la reakcia penso "tekniko signifas eternan panon". Kiam venis novaj kamaradoj, li faris al ili klasan edukon, celante ke ili ĉiam havu ruĝan koron fidelan al Prezidanto Maŭ. Iu juna teknikisto, kiu estis nove diplomita en iu universitato kaj venenita de la penso "tekniko estas la unua", distrumpetita de Liu Ŝaŭki, tuttage sin dronigis en librojn kaj ne volontis labori ĉe fornego. Ĝang Juĉun faris kun li intimajn interparolojn kaj studis kune kun li verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj fine tiu juna teknikisto ŝanĝis sian sintenon.

La tuta ruĝa koro de Ĝang Juĉun inklinis al Prezidanto Maŭ kaj li dediĉis ĝin plene al la revolucio. Por labori sur la supro de la fornego oni devas paŝi sur varmegan ferplaton spite al la flamoj altaj je 2-3 futoj. Ofte estis li, kiu tien suriris la unua. Purigo de la skoria kavo estas laboro bruliga kaj sufoka, ankaŭ tiun laboron Ĝang Juĉun faris ĉiufoje la unua. Li ĉiam prenis sur sin malfacilajn laborojn kaj lasis la facilajn al aliaj.

En 1960 Ĝang Juĉun laboris kiel vicgrupestro de la 7-a fornego. Iufoje, li fandis altgradan ŝtalan alojnon kune kun siaj kamaradoj. Ĝang Juĉun kun plena atento rigardis la buŝon de la fornego kaj atendis fruan elfluon de fajroruĝa fluida ŝtalo. Tamen la kemia konsisto de la ŝtalo ne estis normala. Tiutempe, iu potenctenanto iranta la kapitalisman vojon en la fabriko, kiu ĉasis nur produktan kvanton, ordonis Ĝang Juĉun elfluigi la ŝtalon malgraŭ ĝia nenormala kvalito.

“Elfluigi la ŝtalon?!” ekgapis Ĝang Juĉun kaj tuj demandis: “Kial elfluigi la ŝtalon, kies kvalito ne estas normala?”

Tiu ĉi potenctenanto iranta la kapitalisman vojon tirane kriegis: “Ĉu vi obeas ordonon aŭ ne?” Ĝang Juĉun firme respondis: “Ĝustan ordonon mi obeas, sed malĝustan ne!” Disvolvante sian ekstreman respondecan spiriton al la laboro kaj revolucio, Ĝang Juĉun fine reguligis kune kun siaj kunbatalantoj la kemian konsiston de la ŝtalo kaj akiris venkon!

Ĝang Juĉun kun profunda proletara sentimento skribis la jenajn vortojn sur la randon de sia ŝatata portreto de Prezidanto Maŭ:

Sekvi strikte Prezidanton Maŭ signifas ĝustan direkton,

Sekvi strikte Prezidanton Maŭ signifas venkon,

Sekvi strikte Prezidanton Maŭ signifas gloron,

Sekvi strikte Prezidanton Maŭ signifas feliĉon.

Sekvi strikte Prezidanton Maŭ estas la brila karaktero de la vivo de Ĝang Juĉun. En la periodo de la Liberiga Milito li sekvis strikte Prezidanton Maŭ kaj la unua en sia vilaĝo anoncis sin por subteni fronton per brankardportado. En iu batalo, li savis vunditojn sub pluvo da kugloj kaj kvar sinsekvajn tagojn ne forlasis la fronton kaj tial li estis laŭdita de la trupoj. Kiam komenciĝis la agrikultura kooperiga movado, li strikte sekvis Prezidanton Maŭ kaj konvinkis sian patron firme iri la vojon de kooperigo kaj starigis la unuan interhelpan grupon en la tuta vilaĝo. Kiam la granda renegato Liu Ŝaŭki levis en la kamparo

la nigran venton de “tri pliigoj kaj unu fikso”, li senŝanceliĝe sekvis Prezidanton Maŭ kaj plurfoje skribis al sia patro ke la patro aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ, tutkore servu al kolektivo kaj ĉiam faru revolucion. En 1961, kiam Liu Ŝaŭki freneze efektivigis kontraŭrevolucionan reviziisman linion en funkciigado de entreprenoj, li batalis kontraŭ ĝi. Li diris: “**Politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro.**” Tio estas instruo de Prezidanto Maŭ, neniu devas ĝin ŝanĝi!”

La fajrego de la granda proletara kultura revolucio hardis pli ruĝa la koron de Ĝang Juĉun strikte sekvantan Prezidanton Maŭ. Li diris: “Ni nepre devas iri fronte en la granda kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ. Por defendi Prezidanton Maŭ, mi volonte oferos mian maljunan vivon.” Post publikigo de la dazi-baŭo de Prezidanto Maŭ “**Bombardi la Komand-ejon**”, li foje-refoje ĝin legis kaj konsciis ke sub la kondiĉoj de la diktaturo de la proletaro, la plej danĝera malamiko estas plenmano da morte obstinaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Li multfoje pensis, kial dum multaj jaroj en la laborejo oni antaŭenpuŝis energie la tezojn “produktado estas la unua” kaj “tekniko estas la unua”, sed neniam la tezo ke la penso de Maŭ Zedong estas la unua? Kial la revolucia spirito de la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj dum longa tempo estis subpremata, sed malmultaj fiuloj ĉie impertinentis? Li uzis la penson de Maŭ Zedong kiel armilon, faris analizon kaj fine eltenis kune kun vastaj laboristaj amasoj morte obstinajn potenctenantojn irantaj la kapitalisman vojon. En la tagoj de batalado kontraŭ ĉi tiuj potenctenantoj, Ĝang Juĉun ne dormis dum sinsekvaj noktoj, kaj, tenante la ruĝan trezoran libron en la mano, aktivadis en la batalejo de amasa kritiko por lanĉi intensan kaj persistan atakon kontraŭ la klasaj malamikoj kaj fari senĉese novajn kontribuojn por la popolo.

Ĝang Juĉun ofte diris: “Oni povas varme ami Prezidanton Maŭ kaj la penson de Maŭ Zedong efektive, nur se li varme amas revolucion kaj amason.”

En la 16 jaroj post kiam Ĝang Juĉun venis al la fabriko, li transposteniĝis je pli ol 20 fojoj. Sur ĉiu ajn laborposteno li senescepte laboris diligente, peneme kaj tute senplende. Li diris: “Ĉiu ajn laboro estas laboro por revolucio kaj servo al la popolo.” Li ĉiam postulis de si rigore. Iufoje, kune kun siaj kunbatalantoj, li faris ĝeneralan purigon de la fornego kaj estis laŭdita, tamen

en laŭdado Ĝang Juĉun serĉis sian mankon. Li diris: "La fornego devas esti purigata ĉiutage, en la pasinteco ni ne tiel faris, kaj poste ni devas ĝustatempe ĝin purigi." Alifoje, forno da ŝtalo de li fandita estis preskaŭ fuŝita. Post la labordejoro li staris antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ kaj kun dolora koro diris: "Mi laboris malatente, tio estas nefidelo al Vi, nia amata, kaj estonte mi nepre korektos min." Alfronte al problemoj en laboro, Ĝang Juĉun ĉiam konsultis verkojn de Prezidanto Maŭ. Aŭ en varmega somero aŭ en frosta vintro la unua afero post hejmenreveno por Ĝang Juĉun estis studi ruĝan trezoran libron.

Sub la nutrado de la granda penso de Maŭ Zedong kreskis la heroo. En ĉiutaga vivo Ĝang Juĉun zorgis tutkore ĉiujn aliajn. Iun nokton, frosta vento blovis ostopike. Ree turmentis Ĝang Juĉun la stomaka malsano, sed informiĝinte pri

malsaniĝo de najbara infano, li tuj portis la infanon sur sia dorso kaj marŝis pli ol dek kilometrojn por iri al kuracisto spite al sia propra sufero. En la grupo de Ĝang Juĉun estis maljuna laboristo, kiu devis ripozi pro malsano. Ĝang Juĉun foje-refoje konsolis lin, por ke li bone ripozu kaj ne maltrankviliĝu por la fornego. Sed en lia koro neniam estis loko por si mem. Post lia morto oni trovis en lia poŝo eĉ atestilon por ripozo.

Laŭ la peto kaj konduto de kamarado Ĝang Juĉun dum lia vivo, la revolucia komitato de Benhi-a Ŝtalfabriko agnoskis lin postvive kiel membron de la Komunista Partio de Ĉinio. La heroaj agoj de senlima amo de Ĝang Juĉun al Prezidanto Maŭ cirkulas tra la urbo kaj vilaĝoj de Benhi. La amasoj decidis ĉiam venke marŝi same kiel Ĝang Juĉun laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

Revolucii ĝis la Lasta Spiro

JAN DAGU*

MI estas 89-jara ĉijare. Dank' al Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong mi fariĝas ĉiam pli juna kaj ĉiam pli ruĝa en la koro kun la paso de la tempo.

Ne estas afero por unu-du tagoj, ke mi studas la verkojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ estas granda bonfaranto kaj granda savanto de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Se ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne studus la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ne aŭskultus liajn vortojn, tio estus la plej granda perfido al nia deveno!

En la malnova socio, sub kruelaj ekspluato kaj subpremo de la bienularo mi neniam pasigis unu bonan tagon kaj neniam manĝis ĝis sato. En tiu tempo, ĉio super mia kapo kaj ĉio sub miaj piedoj apartenis al la bienuloj; ĉiujare maturiĝis rizo kaj tritiko, sed neniam greno venis en mian domon. Ne povante plu teni la vivon, jam en mia 15-a jaro, kune kun miaj du fratoj mi laboris kun la patro kiel jaraj dungitoj ĉe bienulo. Ni ofte estis batataj kaj insultataj ĉe la bienulo, kaj, ne povante plu toleri tion, ni migris al Longtian de Jiŝan-gubernio kaj tie vivis el kolekto



Jan Dagu (la dekstra), aktivulino en studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ en la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono

kaj vendo de brulaĵoj. Sed ju pli ni estas en mizero, des pli nin frekventas malfeliĉo. Nelonge post nia transloĝiĝo al Longtian, ĉiuj miaj ses gefratoj mortis, trafite de epidemio. Kaj baldaŭ ankaŭ la edzo kaj niaj du infanoj mortis unu post alia. Postvivis nur mi sola kiel senparenca vidvino, kiu fariĝis duonmorta pro multaj malsanoj tra la tuta korpo kaj pro diversaj turmentoj.

Estas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu liberigis min kaj donis al mi la hodiaŭan feliĉan vivon. En 1950, kiam mi estis jam 70-jara, min trafis malsano sur la monto. Intimuloj PLA-anoj dorsportis min de sur la monto al sia sanitarejo pli ol 25 kilometrojn fore kaj poste transsendis min plue al la Urba Hospitalo de Liuĝou, kaj tiel savis min el morto. Nun mi estas freŝe vigla en la spirito kaj malofte malsaniĝas. La malnova socio turmentis min ĝis kripliĝo, dum

la nova socio faras min ĉiam pli juna en la vivo. Pensante pri tio, mi eĉ en mia sonĝo krios laŭte: "Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!" Komparante la dolĉon de la nova socio kun la suferoj en la malnova socio, kiel mi povus ne legi la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ne aŭskulti liajn vortojn?!

FARI BONOJN DUM LA TUTA VIVO POR LA REVOLUCIO

Post studo de la verko de Prezidanto Maŭ *Memore al Norman Bethune* mi venis al la kompreno, ke por fariĝi homo utila al la popolo, oni devas dediĉi sin al la kolektivo per la tuta koro, en ĉiu afero kaj dum la tuta vivo.

De post la Liberiĝo, mi aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj faras ĉiujn laborojn la

unua, neniam ŝparante mian forton. Mi tre ŝpare uzas la perlaboritan monon kaj aranĝas la riĉan vivon en malriĉa maniero. Naŭfoje mi veturis al Nanning por ĉeesti kunvenon kaj mi elspezis entute nur dek cendojn el mia poŝmono. Prezidanto Maŭ konstante instruas al ni **“ŝpareme fari revolucion”**, do mi uzas la ŝparitan monon kaj grenon tie, kie ĝin plej bezonas la revolucio.

De kelkaj jaroj, por subteni la konstruadon de la ŝtato, en ĉiu jaro mi bredas porkon kaj kelkajn kokojn por vendi ilin al la ŝtato. Ĉiufoje, kiam mi pelis la porkon al la aĉetstacio, mi ĉiam ne manĝigis la porkon, sed kunportis kun mi la nutraĵon por doni al ĝi post peso. La unuan fojon, kiam mi vendis malsatan porkon, kamarado de la aĉetstacio ne komprenis min. Rimarkinte ke la porko estas malvigla pro malsato, li pensis ke ĝi estas malsana porko. Mi klarigis al li ridetante: “Estu trankvila, mia porko tute ne estas malsana.” Post kiam la porko estis pesita, mi tuj manĝigis ĝin per la kunportita nutraĵo. Post kiam la porko ĝissate manĝis, ĝi fariĝis tre vigla. Mi petis refoje pesi ĝin, kaj montriĝis, ke ĝi fariĝis 14 kilogramojn pli peza ol antaŭe. Nun la kamarado de la aĉetstacio ekkomprenis min kaj diris kortuŝite: “Ho, avino! Vi ja estas bona ekzemplo imitinda por ni!” Mi sentis, ke la afero estas tre ordinara kaj devas esti tiel farita. Tamen la kamaradoj de la aĉetstacio baldaŭ ĝin vaste diskonigis. Nun plejparto de la komunumanoj de nia brigado vendas al la ŝtato porkojn kaj kokojn malsatajn.

En la antaŭlasta jaro, pro la damaĝo en la produktado kaŭzita de stagna inundo en printempo kaj sekeco en aŭtuno, la vivo de iuj komunumanoj troviĝis en malfacilo post la streĉa printempa plugado. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ prizorgi la vivon de la popolo, mi iris al kadroj por interkonsiliĝi pri la problemo organizi la amasojn studi la instruojn de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur la propraj fortoj kaj admoni ilin aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ helpi sin per la propraj fortoj kaj ne etendi la manon al la ŝtato. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“ĉiuj en la revoluciaj vicoj devas zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian”**, mi donis al la brigado la 180 kilogramojn da greno ŝparitajn dum kelkaj jaroj kaj la 30 juanojn akiritajn per porkovendo por ke la brigado unuece aranĝu helpon al la malfacilaj familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Nur tiel malmulte mi lernis de Bethune la spiriton de **“kompleta sindono al aliaj sen ajna kon-**

sidero pri si mem”. Tamen, miaj agoj baldaŭ cirkulis inter la komunumaj gvidantoj. Foje, en kunveno de kadroj, la gvidantoj de la komunumo alvokis la kadrojn kaj komunumanojn lerni de mi. Mi diris: “Mi agas laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ. Ni ĉiuj devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj lerni de Bethune.”

Prezidanto Maŭ instruas: **“Ne estas malfacile por iu fari iom da bono. Malfacile estas fari bonon la tutan vivon...”** Mi ne scias, kiom da tempo ankoraŭ restos al mi por servi al la popolo. Tamen mi volas kiel eble plej multe studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, agi fidele al Prezidanto Maŭ kaj oferi fortojn por socialismo en la revolucia spirito **“batali por ĉiu minuto”**. Mi konstante avertas min: Por ĉio kolektiva ne domaĝu eĉ vian maljunan vivon, sed por ĉio egoisma faru nenion.

DEDIĈU PLI DA FORTO POR SOCIALISMO

Antaŭ kelkaj jaroj la gvidantaj kadroj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj foje kaj refoje konsilis al mi: “Vi estas tiel maljuna kaj indas vivi emerite por bone pasigi viajn lastajn jarojn!” Mi pensis tiam, ke kvankam mi estas maljuna, tamen mi ankoraŭ kapablas labori, povas iri montvojon kaj facile vektporti pli ol 40 kilogramojn, kiel mi povas ĝui senfaran vivon? Mi diris al ili: **“Dankon pro via favoreco. Ju pli vi prizorgas min, des pli mi devas labori kune kun vi sur la kampoj por ĉiam konservi la naturon de la laboranta popolo kaj daŭrigi la revolucion.”**

De pli ol dek jaroj, escepte de kunvenado, lernado kaj propagandado aliloke, mi neniam lasis min pasigi unu tagon sen laboro sed ĉiutage iras frumatene al kampo kaj revenas vespere malfrue. Komunumanoj diris: “Vi aĝulino ne tro laciĝu vin per laboro, iom ripozu.” Mi pensis: En la pasinteco, kiam mi laboris kiel jara dungito ĉe bienulo, ĉu mi havis tempon por ripozo? Eĉ en festaj kaj novjaraj aŭ en frostaj kaj neĝaj tagoj, la bienulo ankoraŭ devigis min kolekti brullignon sur monto. Hodiaŭ ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj emancipiĝis, ni do devas labori tutkore por la kolektivo kaj tutanime por la revolucio. Ĉiufoje, kiam mi iris aliloken por ĉeesti kunvenon, mi neniam forgesis la aferojn de la brigado. Apenaŭ mi revenis, anstataŭ iri al mia domo, mi tuj iris al kampo por labori kune kun la komunumanoj. Mi opinias, ke dediĉi pli da forto al socialismo signifas pli da fideleco al Prezidanto Maŭ, ke labori pli da tempo por la kolektivo signifas havigi

pli da riĉaĵo por la ŝtato kaj heredigi pli da feliĉo al la postaj generacioj!

Nia Longtian-brigado troviĝas en montregiono kaj posedis en la pasinteco malmulte da kampoj, el kiuj la plejparto estis sekkampoj. Por ŝanĝi la malriĉan kaj malprogreseman fizionomion de Longtian, sub la gvido de la kompartia filio de la brigado, kune kun la kadroj de la brigado kaj de la produktaj grupoj mi mobilizis la vastajn amasojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sinapogi sur la propraj fortoj, strebi al prosperiĝo kaj grandskale entrepreni akvoutiligajn konstruojn kaj tiel disvolvis malfacilan batalon por transformi la naturon.

Dum la lastaj kelkaj jaroj, nia komunumo kaj brigado konstruis tri relative grandajn akvokonservejojn, kaj mi partoprenis la konstruadon de ĉiu el ili. Mi manĝis kaj vivis kune kun la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sur la konstruejo. Ĉian laboron, ĉu terfosado aŭ terportado, mi partoprenis senescepte kaj persistis ĝis ilia finkonstruo.

En la antaŭlasta jaro, nia produkta grupo decidis konstrui plian akvokonservejon. En la tuta grupo estis nur pli ol 50 personoj, kiuj havis laborforton. Ne estis facila laboro konstrui akvokonservejon por ni! Necesis porti ŝtonojn de sur montoj kaj fosi kaj amasigi teron por fari digon. Post pli ol dektaga laboro ne multe kreskis la fundamento de la digo. Tiam mankis sufiĉa memfido al iuj el la komunumanoj. Mi do studis kune kun ili la artikolon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* kaj mobilizis ĉiujn virojn kaj virinojn, infanojn kaj maljunulojn kune labori sur la konstruejo, kaj fine ni sukcese plenumis la taskon.

Dum la lastaj jaroj mi partoprenis fizikan laboron, kvankam kun la paso de la jaroj ĉiam pli kreskis al mi la aĝo, tamen mia sanstato fariĝis ĉiam pli bona jaron post jaro, kaj mi sentas, ke mi plijuniĝas kun la paso de la tempo.

REVOLUCII ĜIS FINO SEKVANTE PREZIDANTON MAŬ

En la movado de la granda proletara kultura revolucio, varme respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj junaj ruĝaj gvardianoj forte ribelis kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj kontraŭ la burĝara reakcia linio, kaj la situacio estas bonega.

Tamen, troviĝas ankaŭ iuj kadroj, kiuj ne komprenis tiun ĉi grandan amasan movadon. Jang Hangang, la estro de nia produkta grupo ĉagreniĝis, kiam la amaso publikigis kelkajn da-zibaŭojn pri li, tiel ke li ne kuraĝis plu respondi pri la aferoj de la produkta grupo kaj eĉ elmontris plendemon. Mi pensis, ke maljuna Jang devenas de laborula familio, havas firman klasan starpunkton, kaj de la agrara reformo ĝis nun li ĉiam persiste gvidis la amasojn iri la socialisman vojon kaj montris sin tre aktiva. Tian bonan kadron ni nepre devas helpi. Mi do meminciate vizitis lin, por lin admoni, sed, antaŭ ol mi finis mian parolon, li jam deturnis sin kaj foriris.

Kion fari? Mi unue turnis min al la ruĝaj gvardianoj, milicanoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj detale diris al ili ĉion pri maljuna Jang, kaj interkonsiliĝis kun ili por subteni lin levi sian energion por fari la revolucion. Ĉiuj konsentis al mi pri la ideo, kaj mi denove vizitis maljunan Jang kaj diris al li: “Ĉu vi sentas vin senkulpa antaŭ nia amata Prezidanto Maŭ, kiam vi ne plu kuraĝas labori post kiam vi estis iom ‘sturmita’ de la amaso? Estas bona sed ne malbona afero, ke la amaso kritikis vin, kiam ĉe vi estas mankoj. Vi devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj kuraĝe elpaŝi por fari revolucion.” Tion dirinte, mi deprenis de sur mia brusto la insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj alpinglis ĝin sur lian bruston. Mi diris: “Vi devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj ne devas neglekti la koron de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!” Rigardante la ore brilantan insignon sur sia brusto, maljuna Jang emocie levis la ruĝan trezoran libron de Prezidanto Maŭ kaj kun larmoj en la okuloj faris solenan ĵuron antaŭ portreto de Prezidanto Maŭ: “De nun mi nepre aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj revolucios ĝis fino!”

Kiam energio de la kadroj estis levita kaj la amaso estis mobilizita, ardiĝis la revolucio kaj bolis la produktado.

De post la Liberiĝo, mi povis fari ion por la Partio kaj la popolo, tion mi dankas al tio, ke mi aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj agas laŭ liaj instruoj. Mi decidis lerni kaj revolucii dum la tuta vivo kaj revolucii ĝis fino, strikte sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

Protokolita de **GUANGGJUN**

**La rakontinto estas membro de la Revolucia Komitato de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono kaj maljuna malriĉkamparanino de Longtoŭ-komunumo en Jiŝan-gubernio.*

Ĉiama Antaŭenmarŝo

—Pri kamarado Li Hinĵuj de Pekina Trupo kiu edukas intelektulojn per stilo de malluksa vivado kaj penema luktado

JAM frue antaŭ 20 jaroj, antaŭ la naskiĝo de la nova Ĉinio, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ senlace admonis nin: “La ĉina revolucio estas grandioza, sed la vojo post la revolucio estos pli longa, la laboro pli grandioza kaj pli peniga. Tion ni devas bone klarigi en la Partio nun, por ke la kamaradoj daŭre restu modestaj, diskretaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de malluksa vivado kaj penema luktado.”

Dank’ al nutrado de la sunlumo kaj rosoj de la penso de Maŭ Zedong, firme memorante ĉi tiun instruon de Prezidanto Maŭ kaj disvolvante la bonan stilon de nia Partio pri malluksa vivado kaj penema luktado en la revolucia procezo, multaj kompartianoj kaj revoluciaj kadroj tenas la plenan revolucian energion kaj senĉese faras novajn meritojn por la popolo. Kamarado Li Hinĵuj, kiun ĉisube ni konatigas al niaj legantoj, ĝuste estas unu el tiaj kamaradoj.

Iun tagon de la frua vintro de 1968, kun tornistro Li Hinĵuj en vigla animo enpaŝis la domegon de iu scienc-esplora institucio sub la Ŝtata Scienc-teknika Komitato. Kiam liaj piedoj en multpece flikitaj tolsuoj surpaŝis la ŝtuparon, li nedeteneble dronis en meditado.

En la malnova socio li estis devigita paŝti bovojn por bienulo en frostaj tagoj, kaj la piedoj iam enŝovis en bovfekajon por varmigi; sur la batalkampo en Koreio, la piedoj kuris sur la neĝo por persekuti usonajn banditojn kaj dum dekelkaj jaroj post patrioreveno la piedoj aŭ iris en kampon

por transplanti rizplantidojn aŭ surgrimpis krutan monton por kartodesegni.... Hodiaŭ, tiu ĉi paro da piedoj eniris la domegon de institucio de la superstrukturo.

Li Hinĵuj pensis: Ke Prezidanto Maŭ komisiis al la laborista klaso la grandan historian taskon de gvido de batalo, kritiko kaj reformo en la sfero de superstrukturo, tio estas la iniciato en la homara historio kaj eminenta politiko por komplete enterigi la malnovan mondon. Kiel li povis ne emociiĝi en la koro, kiam li, pasinta paŝtknabo, suriris la novan pozicion de superstrukturo hodiaŭ!

Li Hinĵuj profunde komprenis, ke por bone konduki batalon, kritikon kaj reformon en institucio de superstrukturo estas necese havi gvidon de la penso de Maŭ Zedong kaj subtenon de la vastaj revoluciaj amasoj. Li demetis la tornistran, tuj prenis la ruĝan trezoran libreton de Prezidanto Maŭ kaj iris inter la amasojn kune kun kamaradoj de propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong.

Kiam li revenis, jam estis profunda nokto. Batalanto Ĉiĉjo kuŝanta apud li montris al li la littukon kun multaj flikaĵoj sur la lito kaj diris: “Via littuko vere mirigis intelektulojn en la domo kaj kelkaj diris, ke estas necese ŝanĝi, ĉar oni ne bezonas pagi multe por aĉeti littukon!” Li Hinĵuj nenion respondis, li nur milde brosis la littukon kaj ekkuŝis.

Kuŝante sur la lito, Li Hinĵuj neniel povis endormiĝi.

Kamarado Li Hinĵuj hejme studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun sia edzino.



Li ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Sen firma kaj ĝusta politika direkto, estas neeble instigi laborstilon de penega batalo; sen laborstilo de penega batalo, estas neeble efektiviĝi firman kaj ĝustan politikan direkton.”** Ho, jes! Penega batalo neniam estas disigebla de ĝisfunda revolucio kaj de strikta sekvado al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Li rememoris, ke en 1951 ĵus kiam li aliĝis al la armeo, veteranaj estroj ofte rakontis al li, kiel la popola armeo venkis la enlandajn kaj eksterlandajn klasajn malamikojn per milio plus fusiloj disvolvante la stilon de penega batalo sub la eminenta gvido de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ en la grandaj Kontraŭjapana Rezistmilito kaj Liberiga Milito. Li rememoris ankoraŭ, ke dum instruado al li pri vestoflikado en la kontraŭaerataka ŝirmejo sur la batalkampo en Koreio en 1952, la subplotonestro diris al li tenere: “Penega batalo estas revolucia tradicia trezoro, kiun oni neniam devas perdi!”

Rememorante pri tio, Li Hinĵuj sobre venis al kono: “La littuko estas tre malnova kaj tre ĉifona, ĝi ja estas ne tro akorda kun tiu ĉi domego kaj tiea dekoracio; tamen, oni des pli ne devas

ŝanĝi la littukon. Ŝanĝo de littuko estas bagatelo, sed perdi la stilon de malluksa vivado kaj penema luktado de la Partio estas granda afero. Li Hinĵuj instigis sin mem: Kiam oni surpaŝas pli altan etaĝon, la penso de malluksa vivado kaj penema luktado ankaŭ devas atingi pli altan gradon.

Li Hinĵuj estas tiu, kiu plenumas kion li mem diris. Li ĉiam kaj ĉie rigore postulas de si mem.

Iun matenon, fajfado por urĝa kolektiĝo de la roto vekis lin. Post alveno al tiu ĉi institucio, li ofte laboris ĝis profunda nokto kaj enlitiĝis tre malfrue. Kaj en la lasta nokto li enlitiĝis tre malfrue. Tamen, malgraŭ laciĝo li tuj ellitiĝis. Alia kamarado konsilis al li: “Tio estas ordinara trejno, vi ne iru!” Li Hinĵuj iom hezitis, kaj sekve li tuj diris firme: “Ne. Mi devas iri!”

La trupo marŝis per granda rapideco. Tiam, Li Hinĵuj trovis, ke apenaŭ li iom hezitis, li jam postlasiĝis de la trupo dekkelkajn paŝojn fore. Li do flugrapide alkuris, kaj fine kuratingis la trupon.

Tio ĉi profunde kortuŝis kaj edukis la batalantojn. Tamen Li Hinĵuj memkritikis ke li iam

postlasiĝis de sia trupo je dekkelkaj paŝoj dum ĉifoja urĝa kolektiĝo.

Iufoje, Li Hinĵuj iris al loĝejo de la batalantoj de la unua plotono. Kiam li malfermis la pordon, li trovis, ke anstataŭ la malnova tablo staras antaŭ li nova skribtablo. Li demandis: “De kie venis la tablo?” “Ĝi antaŭe estis uzata de la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon! Nun estas vico al ni ‘krudaj kampuloj’ por iom ĝui!” respondis batalanto en videbla ĝojo. Tio mirigis Li Hinĵuj. Li pensis: Prezidanto Maŭ sendis nin ĉi tien ja por transformi la malnovan superstrukturnon, sed ne por ĝui! Avidi ĝuon estas burĝara ideo, kiun ni neniam devas havi. Malluksa vivado kaj penema luktado estas la naturo de ni proletaro, kiun ni neniam devas perdi eĉ je momento. Li senprokraste raportis al la supera instanco pri tio kaj venigis kadrojn de la roto kaj diris signifoplene: “Tio ĉi estas problemo ne pri unu tablo, sed pri tio — kiu remuldu kiun. Kiam ĉe ni aperas kaj plie disvolviĝas la ideo pri ĝuo, ni ne nur ne povas remuldi la intelektulojn laŭ la fizionomio de la laborista klaso, sed male, ni estos korodita de la burĝara ideologia stilo kaj ŝanĝos nian koloron. Tiel agante, ni vanigus la esperon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.”

Tio, kion diris Li Hinĵuj, meditigis aliajn. La kadroj de la roto tuj konvinkis la batalantojn forporti la skribtablon kaj konscie deprenis superfluan telefonon.

Prezidanto Maŭ nin instruas: **“La proletaro volas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, kaj ankaŭ la burĝaro volas tion fari laŭ la sia.”** Tra la ŝtormo de la granda proletara kultura revolucio, kvankam plenmano da reakciaj burĝaraj reprezentantoj estis malkovritaj, tamen la burĝara ideo dissemita de ili ne estis eliminata. Tial, Li Hinĵuj kaj la kamaradoj de la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong mobilizis kun granda atento konstante la vastajn revoluciajn amasojn fari iniciativan atakon kontraŭ la malnova ideologio kaj malnova stilo de la burĝaro. Li rimarkis, ke en tiu ĉi loko kie amasiĝas intelektuloj, rezulte de longtempa veneno de la burĝara reakcia linio, iuj avidas komforton kaj antipatias laboron, kutimas al vivo dependa de aliaj en prenado de akvo kaj en purigado de planko, kaj iuj eĉ ne volas mem purigi sian cindrujon. Li pensis, ke estas necese remuldi la malnovan ideon kaj malnovan stilon de la burĝaro per la nova ideo kaj nova stilo de la proletaro. Li konscie prenis sur sin la devon de purigisto en la domego. Ĉiun matenon post ellitiĝo li gvidis la batalantojn purigi

la domegon, balaante de la unua etaĝo ĝis la kvara. En la komencaj tagoj, tiuj intelektuloj kiuj timas laciĝon kaj tenas sin fore de malpuraĵo, povis sidi trankvile, sed en la tria, kvara.... tago, ili jam ne povis teni sin trankvilaj kaj iuj el ili komencis mem fari tiun laboron. Ili diris: “Kamarado Li Hinĵuj ne nur helpis nin purigi la ĉirkaŭejon, sed pli grava estas tio, ke li helpis nin forbalai la burĝaran ideologion el nia cerbo donante ekzemplon per stilo de penema luktado!”

Troviĝis intelektulo, kiu estas filo de laborulo. En sia 6-7-a jaro li jam iris al kampo por serĉi sovaĝajn legomojn. Estas Prezidanto Maŭ kiu lin savis el la mizero kaj ebligis lin fini kurson en alta lernejo. Rezulte de veneno de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, li iom post iom forgesis sian devenon, fariĝis frandema kaj sinornamema kaj ĉasis famon kaj profiton. Post veno al la Ŝtata Scienc-teknika Komitato li enviis la vivmanieron de tiuj reakciaj burĝaraj aŭtoritatuloj elekteman en manĝado kaj vestado kaj opiniis, ke li montriĝos kiel kruda kampulo, se li ankoraŭ surmetos la malnovan vatitan veston surportatan en sia lerneja tempo. Sed kiam li vidis, ke Li Hinĵuj, veterana kamarado, kiu partoprenis la revolucion jam preskaŭ 20 jarojn, nun tamen portas ĉemizon kun flikaĵoj, uzas littukon pecon sur peco flikitan, li estis profunde edifita. Li rememoris pri la suferplena historio de sia familio, forte kritikis la penson “legi librojn por fariĝi estro” dissemitan de Liu Ŝaŭki kaj decidis preni Li Hinĵuj kiel ekzemplon por ĉiam sekvi strikte Prezidanton Maŭ kaj fari revolucion en malluksa vivado kaj penema luktado. Li elserĉis kudrilon, kaj atente flikis la malnovan vatitan veston portatan en la altlernejaj tagoj. Lia edzino diris: “Ne fliku plu, sed ŝanĝu.” “Tio, kio devas esti ŝanĝita, ne estas la malnova vesto, sed mia malnova ideologio!” respondis li. Lia edzino volis fliki por li, sed li diris: “La truon sur la vesto vi povas fliki por mi, sed la truon en mia ideologio vi ne povas fliki anstataŭ mi!”

Dank’ al la eduko kaj influo de la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong, en la spirita fizionomio de la intelektuloj okazis profunda ŝanĝiĝo. Multaj laboras en sinsekvaj diurnoj, dediĉante sian tutan entuziasmon al teno de revolucio kaj stimulo de produkto. En konkero de iu teknika enigmo, revoluciaj amasoj de iu unuo faris penemajn luktojn en du sinsekvaj monatoj kaj fine sukcesis en provfabrikado, kon-

scie lernante de Li Hinĵuj kaj multaj aliaj laboristoj majstroj la spiriton de penega batalo.

Matenon, kiam la ĉielo ankoraŭ ne heliĝis, Li Hinĵuj jam ellitiĝis. Por ne ĝeni aliajn kamaradojn li absorbite studis en la koridoro la raporton de Prezidanto Maŭ en la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio.

“Pro la venko, eble kreskos en la Partio la humoroj de aroganteco, de memtitolita meritulo, de stagnado kaj senvoleco por progreso kaj de avido al komforta ĝuado kaj malinklino al plua malluksa vivo.”

Li Hinĵuj ripetade legis la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj sentis, ke Prezidanto Maŭ diris tion kvazaŭ ligante ĉitiean staton. Ju pli li lernas des pli li profunde komprenas la instruon de Prezidanto Maŭ kaj varme amas la penson de Maŭ Zedong.

Li Hinĵuj naskiĝis en malriĉkampana familio apud Zunĵi, Gujĝoŭ-provinco. De sia infanaĝo li jam estis devigita paŝti bovojn por bienulo kaj neniam surportis ŝuojn antaŭ la aĝo de 8 jaroj. En la malnova socio, li estis devigita labori naŭ jarojn kiel bruto por bienulo kaj kapitalisto. Li neniam forgesos, ke estas Prezidanto Maŭ kiu emancipis lin kaj milionojn da suferplenaj klasaj fratoj, estas la penso de Maŭ Zedong kiu nutras lin en lia kreskado. Depost kiam li fariĝis soldato, Li Hinĵuj domaĝis eĉ unu cendon, ĉie tenis sin


ŝpareme kaj diligente, sed neniam forgesis doni helpojn al aliaj. Iufoje, li preferis mem piediri kelkdek liojn sub la arda suno, sed donis sian aŭtbileton al onklino malriĉkampanino kiu ne sukcesis aĉeti. La aranĝo en la domo de Li Hinĵuj estas tre modesta. Iuj konsilis al li kelkajn meblojn aldoni, sed li respondis: “En komparo kun la malnova socio, en komparo kun la klasaj fratoj en la mondo kiuj ankoraŭ ne estas liberigitaj, mi opinias mian vivon tre bona. Al mi sufiĉas manĝo kaj vesto, ankoraŭ kion mi bezonas aldoni?” Lia edzino plurfoje petis al li aĉeti lignokeston. Sed li prokrastis tion sufiĉe longe kaj fine aĉetis el magazeno du kartonajn porpakajn kestojn. En manĝejo Li Hinĵuj ĉiam aĉetas plej malkaran manĝaĵon.

Li Hinĵuj vivas tiel ŝpareme kaj diligente, do por kio li uzas la monon? La afero estas tia: Li subtenas la kolektivitan ekonomion de la popola komunumo kaj la socialisman konstruadon de la patrio per centoj kaj centoj da juanoj. Li diris: “La mono laŭ sia origino estas de la popolo. Nur servigi ĝin al la popolo kaj al la revolucio, oni povas diri, ke oni elspezas ĝin en plej ĝusta loko.”

Dum preskaŭ 20 jaroj, kamarado Li Hinĵuj ĉiam konservas la bonan stilon de modesto, diskreto, malluksa vivado kaj penema luktado kaj fariĝis bona ekzemplo imitinda por ĉiuj.



Kvankam kamarado Li Hinĵuj estas tre okupata de laboroj kaj kunvenoj, li tamen persiste partoprenas fizikajn laborojn.



Vera Volo de la Sovetunia Popolo

EL sia kontraŭrevolucia bezono, la sovetunia reviziisma renegata kliko senĉese fabrikis frenezajn kontraŭĉiniajn incidentojn, sed tiu ĉi bando de renegatoj senhonte priskribas la kontraŭĉiniajn fiagojn projektitajn de ili mem kiel manifeston de “forta volo de la tuta sovetunia popolo”. La sovetunia reviziisma renegata kliko intencas subfosi la profundan revolucian amikecon inter la ĉina kaj sovetunia popoloj per tia trompado, sed tute vana restos ilia klopodo. La sovetunia popolo, vivanta sub la faŝisma regado de la sovetunia reviziismo, esprimis per ĉia rimedo al ĉinaj kamaradoj sian senliman amon al la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj sian inklinon al la socialisma Ĉinio, spite al minaco de perforto. Nur tio ĉi estas manifestiĝo de vera volo de la sovetunia popolo.

**“MI ĈIAM SEKVS KAMARADON
MAŬ ZEDONG”**

Iun matenon, en landlima stacio, iu juna sovetunia laboristo haste alrapidis de malproksime al ĉina fervojisto kaj diris al li ridetante: “Jen fine mi trovis ŝancon!” Tion dirinte, li rapide elpeŝigis malgrandan objekton kaj ĝin donis al la ĉina fervojisto. Li daŭrigis emocie: “Tio ĉi estas memoriga

insigno kun portreto de Stalin, kiun mia patro akiris je la venko de la Granda Patria Milito. Paĉjo ĝin postlasis al mi kaj diris al mi kun zorgemo, ke mi ĉiam ĝin konservu kaj neniam forgesu Lenin kaj Stalin, kaj li diris al mi zorgeme, ke mi ĉiam sekvu Maŭ Zedong. Mi volas ĝin interŝanĝi kun vi por insigno kun portreto de Maŭ Zedong kaj ĝin konservi por ĉiam.” La ĉina fervojisto profunde komprenis lian deziron kaj tuj deprenis la insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ de sur sia brusto kaj ĝin donacis al la sovetunia amiko kaj samtempe redonis al li la insignon kun portreto de Stalin. Tiu ĉi emociiĝis ĝis larmoj kaj tenante la insignon per siaj ambaŭ manoj, diris foje kaj refoje: “Mi ĉiam memoros la vortojn de mia patro kaj ĉiam sekvos kamaradon Maŭ Zedong.”

**“MAŬ ZEDONG ESTAS LA LENIN EN
NIA KORO”**

Iun vesperon, ĉina laboranto renkontis en iu sovetunia urbo sovetunian armeanon, kaj tiu ĉi meminciate salutis al la ĉina kamarado mansvingante kaj diris al li firme premante lian manon: “Ni estas amikoj, ni estas klasfratoj. Maŭ Zedong estas nia komuna gvidanto, li estas la Lenin en la koro de la sovetunia popolo.” Kaj li aldonis: “La plenmano da aĉuloj Ĥruŝĉov, Brejnev kaj Kosigin

disŝiris diversajn interkonsentojn inter Sovetunio kaj Ĉinio, sed ili ja ne povas disŝiri la nerompeblan amikecon inter la popoloj de Sovetunio kaj Ĉinio.”

“NIA KORO ĈIAM RESTOS KUN VI”

Vagonaro plensarĝita per diverslandaj pasaĝeroj veturis en stacion en nia landlimo. Iu sovetunia pasaĝero kun aspekto de laboristo promenadis tien kaj reen sur kajo, kvazaŭ li havis ion urĝan por fari. Kiam li vidis iun ĉinan laboranton, li haste alproksimiĝis al li, elpoŝigis tolan paketon kaj ĝin donis al la ĉina laboranto. Tiu ĉi disvolvis la pakon kaj trovis, ke en ĝi estas metala ruĝa koro. Montrante unue sian koron kaj poste la metalan koron, la sovetunia pasaĝero diris: “Mi petas kamaradon Maŭ Zedong kredi nin la laboristan klason de Sovetunio, ke nia koro ĉiam restos kun vi. Kamarado Maŭ Zedong estas granda! Kamarado Maŭ Zedong estas granda!”

Fine, li per fingro montris en la direkto al Pekino kaj sincere esperis, ke la ruĝa koro simbolanta la volon de la vasta laboranta popolo de Sovetunio estos portita al Pekino, al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

“NI SOVETUNIAJ LABORULOJ PLEJ AMAS MAŬ ZEDONG”

Iun tagon, iu blankhara sovetunia maljunulino streĉadis sian rigardon sur kajo de iu fervoja stacio, kvazaŭ ŝi estis atendanta karulon longe neviditan. Kiam ŝi ekvidis kelkajn ĉinajn kamaradojn promenantajn sur la kajo, ŝi tuj iris al ili renkonte kaj diris al ili kun intima sento: “Mi jam multfoje venis al tiu ĉi stacio por atendado kaj tre deziras, ke vi donacu al mi insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ.” Kiam ĉina kamarado donacis al ŝi sian portatan insignon, la sovetunia maljunlino pleniĝis de feliĉa sento, kaj dankeme akceptis la plej valoran donacon per ambaŭ manoj. Ŝi verŝis emocie al la ĉinaj kamaradoj la profundan amikecon de la sovetunia laboranta popolo al la ĉina popolo. Sed ĝuste tiam alrapidis kelkaj policanoj de la sovetunia reviziismo por interveni kaj ĝeni. Tute sentime la maljunulino firme tenis la disradiancan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ sur sia brusto kaj severe ilin riproĉis: “Ni laboruloj plej amas Maŭ Zedong kaj ĉiam amas la ĉinan popolon; mi ne permesas, ke vi subfosu la amikecon inter la popoloj de Sovetunio kaj Ĉinio.”

“HAVANTE MAŬ ZEDONG, NI HAVAS ESPERON”

En iu tago de oktobro de la pasinta jaro, iu ĉina kamarado en Sovetunio renkontis sovetunian ŝoforon survoje al la fervoja stacio, kiam li estis revenanta al la patrolando. La ŝoforo montris profundan amon al la ĉina kamarado. Li firme ĉirkaŭbrakis la ĉinan kamaradon kaj intime tenante lian manon li diris kun profunda amo: “Reveninte al via patrolando, nepre salutu grandan Prezidanton Maŭ Zedong kaj salutu la grandan ĉinan popolon por ni la sovetunia popolo! La sovetunia popolo varme amas Maŭ Zedong kaj sopiras Stalin. Kvantkam Ĥruŝĉov, Breĵnev kaj similaj tretis la reputacion de Sovetunio kaj puŝis nian landon sur la vojon de restaŭro de kapitalismo, sed havante Maŭ Zedong, ni havas esperon! Same kiel la Stalin-grupo ni leviĝos en ribelo kontraŭ Ĥruŝĉov, Breĵnev kaj similaj kaj batalos por frakasi la reakcian reviziisman regadon!”

Kiam ili adiaŭis unu la alian, la sovetunia ŝoforo firme kunpremis siajn manojn por esprimi, ke la popoloj de Sovetunio kaj Ĉinio ĉiam unuiĝos.

“LA ĈINA POPOLO ESTAS NIA KORA AMIKO”

Foje, kiam iu ĉina oceana varŝipo albordiĝis en iu afrika haveno, sovetuniaj ŝipanoj ĉeestantaj senĉese salutis niajn maristojn mansvingante. Apenaŭ la ŝipo ĉesis moviĝi, sovetuniaj maristoj konkure kuris amase sur la ferdekon kaj komplimentis al la ĉinaj maristoj premante iliajn manojn, kvazaŭ amikoj post longa disiĝo. Inter ili unu maljuna maristo laŭte kriis “Vivu Prezidanto Maŭ” je renkonto kun la ĉinaj ŝipanoj kaj tuj komencis interbabili kun ili. Li diris: “La ĉina popolo estas kora amiko, la plej bona amiko de ni, la sovetunia popolo! Kiam Stalin vivis, la ĉina kaj la sovetunia popoloj estis en amikeco, kaj nun ili ankoraŭ restas en amikeco. La bastonoj de la reviziistoj ne povas timigi nin, ĉar ni havas amikecon el sango kaj ni havas komunan revolucionan idealon. La ĉefoj de moderna reviziismo de Sovetunio Breĵnev kaj Kosigin ne volas revolucion, sed la sovetunia popolo volas revolucion.” Kaj la maljuna maristo sincere diris krome: “Prezidanto Maŭ estas ne nur granda gvidanto de la ĉina popolo, sed ankaŭ granda gvidanto de la monda popolo.” Li montris sian deziron ricevi insignon kun la portreto de Prezidanto Maŭ. Kaj ricevinte tion de ĉina maristo, li tuj ĝin alpinglis sur sian bruston kun sento de honoro kaj fiero.

Prezidanto Maŭ Zedong

Pri Popola Milito

(Esperanta Eldono)

La libro enhavas la jenajn 9 partojn:

- * **Revolucioj kaj Revoluciaj Militoj Estas Neeviteblaj en Klasa Socio**
- * **El la Pafilo Venas Ŝtatpotenco**
- * **Imperiismo kaj Ĉiuj Reakciuloj Estas Paperaj Tigroj**
- * **La Decida Faktoro de Venko kaj Malvenko en Milito Estas Homoj sed Ne Objektoj**
- * **La Revolucia Milito Estas Milito de la Amasoj**
- * **Fondi Bazlokojn en la Kamparo kaj Sieĝi la Urbojn per la Kamparo**
- * **La Popola Liberiga Armeo Estas Armita Kolektivo Plenumanta Revoluciajn Politikajn Taskojn**
- * **La Strategio kaj Taktikoj de Popola Milito**
- * **Nia Ĉefa Metodo Estas Lerni Militi en Milito**

Eldonita ankaŭ en la lingvoj araba, bengala, birma, angla, franca, germana, haŭsa, hindia, indonezia, itala, japana, mongola, persa, portugala, rusa, hispana, ŝahilia, tamila, taja, urdua kaj vjetnama.

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio

Havebla ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi Shudian,

P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio

Ruĝa Floro de kooperativo

—Raporto el Albanio

LA ore brilanta vespera ruĝo lumigis la heroajn gefilojn kaj la revoluciecan montvilaĝon; kun granda ĝojo revenis de la kampoj la membroj de la agrikultura produkta kooperativo de Gleĉali. Estis aparte ĝoja hodiaŭ la vigla junulino Leĉiu. Alveninte hejmen, ŝi metis la falĉilon sub la olivarbon en sia korto. Veta, ŝia maljuna grizhara patrino, legas absorbite verkon de k-do Hoxha sidante sur la balkono. Vidinte la ĝojegan mienon de sia filino, ŝi ekmemoris sian unuan filinon Leni. Pro siaj du heroaj filinoj ŝi sentis sin feliĉa, kaj plie estis ankaŭ fieraj pro la glora Albana Partio de Laboro kaj la albana popolo.

“Panjo, rapide prepariĝu! La agado de nia Leni jam estas vaste konata. La junulinoj vizitos vin post kelkaj tagoj. Diru, panjo, pri kio ni rakontu?”

Karesante ŝultron de Leĉiu, Veta diris kun emocio: “Mi havas nenion por diri. Ĉion, kion ni faris, mi dankas al la edukado de la Partio. Legu por mi prefere la leteron de k-do Hoxha!”

Kun granda emocio Leĉiu malfermis la leteron de k-do Hoxha:

“Kara kaj glora patrino Veta:

Vi skribis al mi, ke via filino Leni mortis same kiel ĉiu heroo, kiu oferis la vivon por plenumi sian taskon. Mi estas tre kortuŝita de via letero.... Kvankam Leni ne restas plu inter

vi, tamen ŝia nomo gravuriĝas por ĉiam en la koroj de ĉiuj heroaj gejunuloj!”

Ĵetinte rigardon al la radiantaj vizaĝoj de la heroa patrino, Leĉiu tuj sentis sian koron plena de fiereco por la Partio kaj la popolo kaj komencis legi en plena voĉo:

“Niaj popolo kaj Partio estas fieraj pro tio, ke ili havas tiajn gefilojn—montajn aglojn, kia Leni, kiuj senlace laboras, levas singardemon kaj estas pretaj oferi ĉion por la interesoj de sia patrio....

“Ŝia modela agado ĉiam kuraĝigos la gejunulojn al batalo kaj konstruado por fari sian karan Albanion granda floranta ĝardeno kaj solida roko, kiu povas venki ĉiujn malamikojn.”

Kuris feliĉa rideto tra la vizaĝoj de Veta kaj Leĉiu. La vortoj de K-do Hoxha rememorigis al ili multajn pasintaĵojn....

Kiel ruĝa floro plene disvolvita Leni kreskis sur la tero de la agrikultura produkta kooperativo de Gleĉali. Kvankam ŝi ankoraŭ ne havis membrokarton de la Partio de Laboro, tamen ŝia juna koro estis jam plena de la granda penso de la Partio de Laboro kaj la instruoj de k-do Hoxha. Oni varme laŭdis ŝin: “Ĉiam kiel revoluciulo Leni aperas en ĉiuj lokoj kaj kuras rekte al la plej malfacila posteno!”

La historia rezolucio de la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro kaj la instruoj de k-do

Hoxha vekis ŝian senkomparan revolucian entuziasmon. Ŝi decidis timi nenion kaj oferi ĉion por la interesoj de la Partio kaj la popolo.

En aŭtuno antaŭ du jaroj, la agrikultura produkta kooperativo de Gleĉali renkontis novan malfacilon: la forta aŭtuna pluvo falis senĉese kaj la membroj de la kooperativo estis en granda maltrankvilo.

“Komencas jam la pluva sezono antaŭ ol la bonega rikolto estas plene falĉita. Nun, kiam ni tuj ricevos la rikolton post tutjara penado, la malbeninda aŭtuna pluvo putrigos grenojn sur la kampoj!” Tiel interbabilis la kooperativanoj.

Kaj en tiu tempo, Leni gvidante kelkajn junulojn brave kuris al la kampo kie la maizoj estis klinitaj de vento kaj pluvo.

Ili deŝiris korbojn post korboj da oranĝaj maizspikoj kaj portis ilin per bov-ĉaroj al la konservejo. La revolucia energio de Leni kaj tiuj junuloj profunde emociis la vilaĝanojn. Kaj ĉiuj junuloj kaj maljunuloj, viroj kaj virinoj senescepte jetis sin en la laboron kaj rikoltis pli ol 100 tunojn da maizo el sub la pluvego en malpli ol du tagoj.

Leni estis tia batalantino, kiu kuraĝis batali kontraŭ la naturo. Ŝi ne nur tiel agadis en la kooperativo, sed ankaŭ aktive partoprenis en volontulaj laboroj. Ĉiam, kiam la Partio faris alvokon, ŝi certe estis la unua por anonci sin kaj gvidi gejunulojn al la loko, kie la patrio ilin plej bezonas kaj ilin atendis plej malfacila tasko. En la Kvina Kongreso de la Partio de Laboro, la Partio elmetis grandan alvokon: “Antaŭenmarŝu al montoj kaj montetoj por turni la sterilajn montojn en montojn de fruktoj kaj floroj kaj la altajn montojn en grenejojn.” Por rapide altigi la produkton en iu malproksima montregiono kaj ŝanĝi ĝian postrestintan fizionomion, Leni venis kune kun armeo da junaj volontuloj al Malakast en profunda montaro kaj densa arbaro, kun pioĉo kaj ŝovelilo en la manoj. Tie ŝi manĝis, loĝis kaj laboris kune kun la montvilaĝanoj kaj starigis profundan klasan amikecon kun la kooperativanoj en Klapŝi. En tago ŝi faris laboron, kiun povis plenumi nur du junuloj. Nokte, kune kun junulinoj, ŝi venis al la hejmoj de kooperativanoj por propagandi la politikojn de la Partio. Tial ŝi refoje estis elektita kiel modelo en propagando de principoj kaj politikoj de la Partio. Iutempe, ŝi organizis junulojn aŭskulti rakontojn de veteranaj revoluciuloj pri revoluciaj heroaĵoj en la periodo de gerila milito. El

tio ŝi pli bone konis la historion de heroa batalado de la albana popolo kaj ĝian gloran tradicion de maltimo al ofero de sango kaj vivo kaj de kuraĝo al venkado super ĉiuj malfaciloj.

“Tiu ĉi junulino ja estas ruĝa floro en nia montvilaĝo! Ŝi certe fariĝos estonte membro de la Partio de Laboro!” Tiel varme laŭdis Leni la kooperativanoj.

Post fizika laboro en la malproksima montregiono, Leni revenis al Gleĉali kun vigla bonhumoro. Ŝi estis elektita de la gejunuloj kiel estro de la produkta grupo. Sub ŝia gvidado la produkta grupo fariĝis avangarda kolektivo de la kooperativo. La gejunuloj ŝin admiris, ĉar ŝi ĉiam prenis sur sin pezajn taskojn kaj estis ilia intima amiko.

Iutage, ĵus kiam la junulinoj revenis hejmen de la kampoj, iu gvidanta k-do rapide kunvokis ilin kaj diris al ili: “Knabinoj, proksime de nia vilaĝo oni faras militan ekzercon. La imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj intencas nin tirani, sed ni bravaj montagloj estas konkereblaj por neniu malamiko! Ni havas la fidon frakasi per niaj pafiloj kaj pioĉoj ĉiujn malamikojn, kiuj kuraĝos ataki nin! Nun la batalantoj konstruas fortikaĵojn. Kelkaj junuloj proponas, ke ni helpu ilin por fini la konstruadon kiel eble plej rapide. Ĉu vi konsentas ilian proponon?” La junulinoj laŭte respondis unuvoĉe: “Ni ĉiam pretas oferi ĉion nian por la Partio kaj la popolo!” Tiel, portante pioĉojn kaj ŝovelilojn la organizitaj junulinoj venis al la konstruejo de la batalantoj. Komenciĝis arde intensa laboro por konstruado de fortikaĵoj.

“Ni nepre devas plenumi la taskon!” La junulinoj kuraĝigis sin unu la alian, “same kiel la batalantoj ni ne nur manipulos pioĉon kaj ŝovelilon, sed ankaŭ ekzercos nin en pafado.” Leni estis elektita kiel grupestro; ŝi postenigis ĉiujn k-dojn de sia grupo en gravaj lokoj per sia modela agado kaj flamaj vortoj. Ĉiun vesperon, ŝia grupo konstante ricevis laŭdon dum prijuĝado de la laboroj. Kiam oni laŭdis ŝian kapablon, ŝi ĉiam diris: “Ankoraŭ malproksime restas ni de la postuloj! Ni junuloj estas kiel spino de la patrio kaj devas peneghe lukti por la prospereco de la patrio!”

Iutage, Leni iris al laboro antaŭtempe!

La peza pioĉo arĝente brilis en ŝiaj manoj, kaj post momento ŝi ekkuris puŝante ĉareton plene ŝarĝitan per tero. Ŝi diris al si: mi nepre finu la laboron antaŭ la alveno de niaj kamaradoj! Tiel, multaj ĉaroj da tero, sablo kaj ŝtonoj estis rapide

TIANGIN SUKCESE FABRIKIS RAPIDAN BLOVFORMILON DE PLASTA MEMBRANO

La vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj de la Dua Plasta Fabriko de Tiangin sukcese provfabrikis rapidan blovformilon de plasta membrano kaj tiu maŝino de progresinta nivelo forte subtenas la agrikulturan produkton.

Plasta membrano estas urĝe bezonata por agrikultura produktado. Dank' al apliko de ĝi anstataŭ vitro kaj solida papero en kulturo de rizidoj, oni povas fruiĝi kaj abundigi la rikolton; dank' al apliko de ĝi en kulturo de batataj plantidoj, oni povas ŝpari hejtaĵon; dank' al apliko de ĝi en irigacio, oni povas malpliigi la survojan perdiĝon de akvo; se oni kovras la fruktarbojn per ĝi dum disŝprucigo de vermifugo, oni povas pli efike ekstermi fiinsektojn, kaj krome ĝi estas uzebla ankaŭ por fari sakojn por enteni kemian sterkon.

Nun la maŝino jam komencis regulan produktadon. La po-dejortempa produktokvanto de la maŝino estas pli alta je pli ol du obloj kompare kun tiu de ordinaraj blovformiloj de plasta membrano, kaj ĝiaj produktaĵoj estas pli taŭgaj por kontentigi la bezonon en agrikultura produktado.

EKSPozICIO DE FOTOJ KAJ PRODUKTAĴOJ DE ĈINIO EN TOKIO

La 1-an de marto, 1969, inaŭguriĝis en la domo de Kinŝiĉo-stacio de Tokio la Ekspozicio de Fotoj kaj Produktaĵoj de la Ĉina Popola Respubliko, aranĝita de la Etoŭ-distrikta filio de la Japana-ĉina Amikeca Asocio (ortodoksa) de Tokio.

En la mezo de la ekspoziciejo pendis portreto de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ. Murtapiŝo kun enteksitaj gravaj vortoj manskribitaj de Prezidanto Maŭ por japanaj laboristoj-amikoj altiris al si la atenton de la vizitantoj. Ĝin rigardante, ili legis: **“Nur se efektive kombini la universalan veron de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de la japana revolucio, do la japana revolucio sendube venkos.”**

En la ekspozicio montriĝis pli ol tridek mil ekspozitaĵoj, inter kiuj estis fotoj pri la brilaj venkoj akiritaj de la ĉina granda proletara kultura revolucio kaj la argila figuraro “Farm-paga Kolektejo” kaj pli ol sescent diversaj specialaj produktaĵoj de Ĉinio.

transportitaj al malproksima loko. La sulka tero estos jam tuj ebenigita. Sed ŝi volis ankoraŭ labori pli multe kaj pli bone. Ŝi flustris al si: “Estas ankoraŭ tempo por puŝi kelkajn ĉarojn da tero!” Puŝinte ĉaron proksimen al krutaĵo, ŝi forte ekfosis svingante la pioĉon. Kiam ŝi demetis la pioĉon kaj apenaŭ prenis ŝovelilon por ŝarĝi la ĉaron, subite aŭdiĝis bruego: Pum! Amaso da tero kaj ŝtonoj ruliĝis de sur la supro de la krutaĵo. Ŝi volis forfuĝi, sed jam ne eblis. Leni, la junulino, plena de kuraĝeco heroe oferis sian vivon sur sia batalposteno kun senlima amo al la Partio kaj patrolando.

Unu semajnon post la morto de Leni, okazis ankoraŭ pli kortuŝa afero en la sidejo de la roto, al kiu Leni helpis konstrui fortikaĵojn antaŭ sia morto: Iutage, subite iu frapis je la pordo de la kabineto de la politika komisaro. Levante sian rigardon, la politika komisaro vidis, ke vivĝoja junulino staras antaŭ li. El ŝia brilanta rigardo kaj plene vigla juneco, la politika komisaro tuj ekmemoris k-dinon Leni, kiu mortis antaŭ kelkaj tagoj.

Kelkajn paŝojn alpaŝinte, la knabino diris: “Mi estas Leni!”

Multe mirigita la politika komisaro diris: “Kio? Vi estas.... Leni? Kiu Leni?”

“Leni Suderimeja!”

Kelkajn paŝojn alpaŝinte antaŭen, la politika komisaro trovis, ke la junulino tre similas al la antaŭnelonge mortinta Leni, kiu havis heroe bravan aspekton kaj plene vigan spiriton.

Kaj la junulino daŭrigis: “Por plenumi batal-taskon Leni heroe oferis sian vivon. Sed, kiel vi kaj la aliaj k-doj diris, ŝi ĉiam vivos en nia koro! Mi estas ŝia fratino kaj nomiĝas Leĉiu. Mi venas ĉi tien daŭrigi ŝian laboron!”

Tiel, en la loko, kie batalis Leni, aperis nova Leni. Tiu nova Leni batalis kuraĝe kune kun la soldatoj de la popola armeo sur alta monto.

Same kiel la 15-jara kompartiano Shkuta Vata, Leni Suderimeja kvankam havis tre mallongan vivon, ŝi vivos generaciojn post generacioj en la koro de la gejunuloj de la lando de montagloj. Leni Suderimeja, tiu ruĝa floro de kooperativo, por ĉiam pompos sur la kampoj de montvilaĝo. La heroaĵo montras la gloran tradicion de revolucia batalo, grandan komunisman stilon kaj noblan revolucionan heroismon de la albana popolo.



Ruĝaj gvardianetoj de la Elementa Lernejo "7-a de Majo" de Ŝigiaguang studas verkojn de Prezidanto Maŭ.

Plantidoj Forte Kreskas sub la Nutrado de Pluvo kaj Roso

—Notoj pri la propaganda taĉmento de ruĝaj gvardianetoj

Sub la nutrado de la sunbrilo, pluvo kaj roso de la penso de Maŭ Zedong, kreskas la nova generacio de la nova Ĉinio.

Printempa vento verdigis salikojn kaj alportis arĝentajn kantojn de knaboj. En la urbo Ŝigiaĝuang de Hebej-provinco, oni ofte vidas propagandan taĉmenton de ruĝaj gvardianetoj pri la penso de Maŭ Zedong konsistigitan el pli ol 20 geknaboj naivaj kaj vigloplenaj, kiu faras prezentadon por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj entuziasme propagandas la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong en fabrikoj, kazernoj, stratoj, loĝdomoj, aŭtobusoj kaj ĉe kampoj de brigadoj de kamparaj popolkomunumoj. Ili estas lernantoj de la elementa lernejo "7-a de Majo" de la Ŝigiaĝuang-a Vitra Fabriko.

Tiu propaganda taĉmento de ruĝaj gvardianetoj pri la penso de Maŭ Zedong fondiĝis en aprilo

Aĝa malriĉkamparano intime babilas kun ruĝaj gvardianetoj.



1968. Ĝiaj membroj grandparte estas 8-9-jaraj knaboj kaj eĉ la plej aĝaj havas nur 13-14 jarojn. En la granda proletara kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la klasa konscio de la knaboj leviĝis senprecedence alte. Ili heroe diris: La scenejo estas batalejo. Prezidanto Maŭ subtenas nin suriri scenejon, kaj ni ruĝaj gvardianetoj plej aŭskultas liajn vortojn, tial ni nepre frakasos komplete la scenejon, kiun uzurpis la granda fiulo Liu Ŝaŭki por distrumpeti feŭdismon, kapitalismon kaj reviziismon.

Post sia fondiĝo la propaganda taĉmento strikte sekvis la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj mem verkis kaj prezentis multajn programerojn. Tiuj programeroj kun elstarigita proletara politiko havas politikan enhavon tute novan kaj kompare riĉan kaj formojn variajn kaj freŝajn kaj ricevas multan

admiron de la vastaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj. Iufoje, kiam ili faris prezentadon en vilaĝo de Ĝaŭhian-gubernio, venis la informo pri la publikigo de la plej nova instrukcio de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ "**La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion**". Kun nobla revolucia sentimento fidela al Prezidanto Maŭ, ili tuj verkis artan programeron kaj ĝin prezentis post ok minutoj. La malriĉkamparanoj kaj mal-superaĵ mezkamparanoj laŭdis ilin dirante: "Kiom strikte la ruĝaj gvardianetoj sekvas la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ!" kaj aliaj pli ol 60 memverkitaj kaj memprezentataj artaj programeroj kiel "La Ruĝa Suno Lumigas Ŝigiaĝuang", "Ja Vere Bona Estas Lernejo Administrata de Fabriko", "Ne Forgesu la Klasan

Amaron” ankaŭ ricevis varman akcepton ĉe la vastaj amasoj.

Kien la propaganda taĉmento de ruĝaj gvardianetoj pri la penso de Maŭ Zedong iras, tie ĝi faras propagandon. Foje, la knaboj marŝis 15 kilometrojn al Jehe-komunumo de Luanĉeng-gubernio kaj tie prezentis 7 tagojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kiam ili eksciis ke la bredistoj, dommastrinoj havantaj multajn gefilojn kaj malsanaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de produktaj grupoj de la komunumo ne povis rigardi ilian prezentadon, ili meminciate venis al bredistaj ĉambroj kaj domoj de komunumanoj por fari prezentadon. Rigardinte la bonan prezentadon de la geknaboj, la maljuna bredisto Avo Kin emocie diris kun larmoj: “Mi neniam povis rigardi prezentadon en la pasinteco, nur ĉifoje en nia bredista ĉambro mi rigardis vian prezentadon, vi vere indas je la nomo de ruĝaj gvardianetoj de Prezidanto Maŭ”.

La knaboj de la propaganda taĉmento ne nur propagandas fervore la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sed ankaŭ havas la bonan kutimon de varma amo al laboro. Iufoje en okupita sezono de agrikulturo, la knaboj estis prezentantaj en la tria produkta grupo de Nanliu-vilaĝo de Jehe-komunumo de Luanĉeng-gubernio, subite la ĉielon kovris nigraj nuboj kaj tuj estis falonta granda pluvo. La membroj de la taĉmento ekpensis ke la tritiko ĵus rikoltita de komunumanoj en iu kampo estas ankoraŭ ne laŭorde stakita, kaj la respondeculo de la propaganda taĉmento laŭte kriis: “Kunlernantoj! Prezidanto Maŭ instruis al ni: ‘**Necesas forte teni la produktadon de greno.**’ Iru! Ni rapide staku la tritikon!” Tuj post lia krio, la ruĝaj gvardianetoj jam



Ruĝaj gvardianetoj propagandas la penson de Maŭ Zedong en aŭtobuso.

flugrapide kuris al la kampo, iuj brakportis, aliaj ŝultroportis kaj triaj stakis la tritikon. Post duonhora batalo, tritiko rikoltita el pli ol 20 muoj estis komplete stakita bonorde. Post tio, la knaboj alprenis siajn plastajn pluvo-mantelojn, plastajn litkovrilojn k. a. por kovri la tritikan stakon. Kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la grupo informiĝinte alrapidis kaj vidis tion, ĉiuj ili tre kortuŝiĝis kaj diris: “Vi ja vere estas ruĝaj gvardianetoj de Prezidanto Maŭ, havante tiajn daŭrigantojn, kiaj vi, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas tute trankvilaj kiel la maljuna generacio!”

Tiu propaganda taĉmento de ruĝaj gvardianetoj pri la penso de Maŭ Zedong estas forte kreskanta renkonte al la matena suno kaj senĉese akiras novajn venkojn!

Pres-tinktura Fabriko en Pompa Ruĝiĝo

LA printempa vento de la penso de Maŭ Zedong blovas tra nia pitoreska kaj grandioza patrolando. Sub la brila lumo de la suno la Ŝigiaĝuang-a Pres-tinktura Fabriko troviĝas en bunteco. La revolucio en la fabriko progresas en plena vigeleco, kaj la produkto disvolviĝas per verva impeto.

Sub la kuraĝigo de la brila instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion**”, la revoluciaj laboristoj komplete gvidas kaj venke plenumas la taskojn de batalo, kritiko kaj reformo en diversaj etapoj de la fabriko. Komandante ĉion per la penso de Maŭ Zedong la laboristoj estigis mondiskuan revolucion ŝanĝiĝon al tiu ĉi fabriko, kiun oni nomis “ĉiam postrestanta fabriko” en la pasinteco. La taga produktkvanto plialtiĝis de 330,000 metroj antaŭ la granda proletara kultura revolucio ĝis 1,200,000 metroj de post aŭgusto de 1968. Sekve, la produktkvanto triobligiĝis kaj la fabriko funkcias kvazaŭ tri fabrikoj.

REPRENI POVON DE TEKNIKO

En la 10-a de novembro 1967 la revolucia komitato de la pres-tinktura fabriko naskiĝis en triumfaj aklamoj.

Ĝuste kiam la revoluciaj laboristoj frakase abolis reviziismajn regulojn kaj sistemojn kia “Sankciado pri Teknologio” kaj kreis la novan teknikan procedon “multaj tavoloj kaj multaj finoj”, plenmano da burĝaraj reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj” malice kalumniis, ke la revolucia agado de la laboristoj egalas al “preno de ovo per mortigo de kokino” kaj “ne havas natursciencan bazon”, kaj faris diversajn malhelpojn kaj subfosojn utiligante sian provizore retenatan povon de la produkta tekniko.

Kun heroeco la revoluciaj laboristoj diris: “La povon de la tekniko ni nepre devas repreni en niaj manoj.” Sub la forta subteno de la revolucia komitato de la fabriko kaj la PLA-a pro-

paganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong en la fabriko, ili organizis enketan grupon konsistigatan de laboristoj kiel ĉefa forto kaj revoluciaj inĝenieraj teknikistoj kaj revoluciaj gvidantaj kadroj kaj venis en la “ĉefinĝenieran kabineton”. Aro post aro da materialoj publikigitaj post enketaĉdo malkaŝis la internon de tiu ĉi kabineto. Fakto estas ke tiu plenmano da tiel nomataj “inĝenieroj” kaj “specialistoj” estas ne nur ekstreme reakcia en politiko sed ankaŭ tre stulta en tekniko. Antaŭ tri jaroj al iu mekanika “inĝeniero” subite venis ideo reformi lavmaŝinon. En la daŭro de kelkaj jaroj li foliumis eksterlandan materialon, elspezis pli ol 20,000 juanojn kaj fine kunmetis iun “trem-lavmaŝinon”. Tamen post provo oni konstatis, ke ĝia efiko estis eĉ malpli bona ol la malnova, kaj ĝi estis nur neutiligeble sendita al la rubejo. Dum multaj jaroj plenmano da burĝaraj reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj” faris multe da malbonaĵoj utiligante siajn oficon kaj povon. Li Gajhong, laboristo en desegno-presejo, faris ŝanĝon en laborprocedo por plialtigi laborefikon, sed rezulte de tio li ricevis punon de labor-ĉesigo por pentado. Ju pli oni malkovras, des pli klariĝas ilia reakcia vizaĝo. Ju pli ili estas multe kritikitaj, des pli altigita estas la konscio de la laboristoj pri klasoj kaj klasbataloj, multe kreskas ilia revolucia energio, kaj altiĝas la ondoj de la produkta tajdo.

Dum la revolucia amasa kritikado estis starigitaj unu post alia la “amasaj teknikaj stud-grupoj” de la tuta fabriko kaj de la diversaj laborejoj, grupoj kaj grupetoj, kun laboristoj kiel ĉefa forto kaj kun la partopreno de revoluciaj teknikistoj kaj revoluciaj gvidantaj kadroj.

Post kiam la revoluciaj laboristoj de la fabriko reprenis la povon de la tekniko, ili, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri sendo de personoj laborantaj en oficejoj al bazaj unuoj, sendis 72 procentojn de la oficejaj laborantoj kaj teknikistoj al la plejfronto de produkto en la laborejoj por ke ili ricevos reedukon de la laborista klaso. Sub

la inspiro de sinsekvo da brilaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ pri unuigo, eduko kaj remuldo de malnovaj intelektuloj, plejparto de la oficejaj laborantoj kaj teknikistoj de tiu ĉi fabriko jam faris sian unuan paŝon sur la vojo de kombiniĝo kun la laboristoj. Sed inter ili troviĝis ankaŭ kelkaj teknikistoj, kiuj ne povis tuj demeti sian malnov-intelektulan teniĝon post sia alveno al la laborejo, kaj pro tio ili estigis akcidenton en produktado kaj kaŭzis malŝparon al la ŝtato. Ŝajnigante sin scipova kaj opiniante sin prava, teknikisto Ĝong Venĝun erare malfermis valvon kaj elfluigis en kloakon kelkcent kg. da tre valora kemia drogo kiel neutiligeblaĵon. Vidinte tion iu maljuna majstro sentis doloron en sia koro. Kun profunda sento li diris: “Maljuna Ĝong, tio, kion vi elfluigis en la kloakon, ne estas kemia drogo, sed la penso kaj sento de la laborista klaso; tio, kion vi retenas, ne estas neutiligeblaĵo, sed burĝara aroganteco kaj gloramo. En la estonto, kiam vi ne scipovas ion, vi povas al ni demandi. Ni laboristoj ne sentos nin ĝenataj, kaj ni neniam neos vian bonan flankon.” Ĉiu vorto de tiu maljuna majstro trafis la vundan punkton de Ĝong Venĝun. Post kelkaj monatoj Ĝong diris kun profunda kompreno: “Estas pli utile fari fizikan laboron por kelkaj monatoj ol legi librojn por dek jaroj.” Li ja komencis

rekoni, ke la intelektuloj povas ĝisfunde remuldi sian mondkoncepton kaj apliki la scion akiritan el libroj, nur kiam ili iras la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj. Ili sukcesos en nenio, se ili apartiĝos de la laboristoj kaj kamparanoj, de praktiko kaj fizika laboro.

ĈIE PROSPERAS FLOROJ DE RENOVIGO

En la pres-tinktura fabriko buntas la fruktoj de teknika revolucio kaj teknika renovigo kaj ĉie ruĝas la floroj de tekniko.

Kial la movado de teknika revolucio kaj teknika renovigo en tiu ĉi fabriko disvolviĝis tiel vaste kaj profunde? Tre bonan respondon faris majstro Liang Ŝengsuo. Li diris: “Post kiam ni laboristoj deprenis la regpotencon de la partia organizo, administracio kaj tekniko, ni batalis kontraŭ diversaj malamikoj apogante nin sur la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj gajnis venkojn unu post alia. Ni konkeris teknikajn malfacilojn unu post alia en produkta batalo kaj scienca eksperimentado kaj ankaŭ apogante nin sur la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj klopodas atingi kaj superi la avangardan nivelon de la mondo.”

Disvolvante mastran energion en laboro kaj altan revolucian respondecon de laborista klaso,



Kamarado el la PLA-a propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong laboranta en la fabriko interŝanĝas opiniojn kun gelaboristoj pri la kvalito de katuno.

la revoluciaj laboristoj kune interkonsiliĝis kaj kune klopodis, plene disvolvis kolektivan saĝecon kaj kreivon kaj faris kompletan reformon al la ekipaĵoj kaj teknologio de la tuta fabriko. Laŭ nekompleta statistiko la gravaj renovigoj jam nombras pli ol 120, kaj tiel estis unuapaŝe formita la nova teknologia procedo de “du multaj”*, “tri igoj”** kaj “kvar altaj”***.

La antaŭaj elektraj ekipaĵoj de tiu ĉi fabriko estis fabrikitaj laŭ modelo de sovetuniaj reviziistoj. Tiuj ekipaĵoj estis tro grandaj, nefacile manipuleblaj, kaj multe konsumis elektran povon.

Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ “**La ĉina popolo havas fortan volon kaj grandan kapablon, kaj nepre atingos kaj superos la avangardan mondan nivelon en nemalproksima estonteco**”, la laboristoj decidis renovigi la malnovajn ekipaĵojn kaj apliki la mond-avangardan teknikon de silicia rektifado. Tio estas afero tute neimagebla por tiu plenmano da burĝaraj reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj”. Sed Ĝang Guanghaj kaj aliaj, kiuj partoprenis la renovigon, plejparte estis junaj teknikaj laboristoj kaj, kvankam ili ne havis teknikan materialon servantan kiel referencon, tamen post kontinua peniga batalado ili elmetis tri projektojn en mallonga tempo. Poste ili vaste petis la opiniojn de la veteranaj laboristoj, fine certigis unu el ili kaj komencis fari eksperimenton. Dum eksperimentado ili renkontis multajn malfacilojn, kaj ili faris tiun akran batalon tute apogante sin sur la penso de Maŭ Zedong. Kiam ili trovis, ke ili ne havas sufiĉe da siliciŝtalaj lamenoj, ili aĉetis senutilajn siliciŝtalajn lamenojn kostantajn ses cendojn po kg., disvolvante la spiriton apogi sin sur propra forto. Post ripetada eksperimentado en du monatoj ili fine sukcese provfabrikis silici-rektifan transformatoron kun avangarda nivelo de la mondo, kaj ili fabrikis sep en la daŭro de kelkaj monatoj.



Junaj laboristoj de la maŝinejo sukcese reformis la kaldronon por boligi teksaĵon en akvo.

Kiam tiu ĉi nova ekipaĵo estos vaste uzata en la tuta fabriko, 1,000,000 vathoroj da elektro povas esti ŝparita en unu jaro.

Rekta presado de grandaj flordeseĝoj estas nova teknologio en prestinktura industrio, kaj tiamaniere estos kreita nova produkto. Tia flordeseĝa ŝtofo tre bela, malvulgara kaj kun brila koloro tre plaĉas al la vasta amaso de laboristoj, kaj kamparanoj. Antaŭ la granda proletara kultura revolucio la burĝaraj reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj” multfoje faris eksperimentojn sed neniam sukcesis. Laboristo Gan Guoliang kaj aliaj, kiuj partoprenis tiun ĉi renovigon, ripetade studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ “tri popularajn artikolojn”, en la kurso de la penso

de Maŭ Zedong okazigita de la laborejo. Kun decidemo ili diris: “Ni laboristoj devas imiti la ekzemplon de la Malsaĝa Avo, kiu translokgis la montojn, kaj nepre konkeros tiun fortikaĵon.” Post multfoja eksperimento tiu nova teknologio — rekta presado de grandaj flordeseĝoj — sukcese realiĝis post kelkaj tagoj. La sukcesaj eksperimentoj de renovigo unu post alia donis fortan kritikon pri la reviziisma linio de “administrado de fabriko pere de specialistoj” praktikita de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en tiu ĉi fabriko, kaj ankaŭ edukis la amason kaj revoluciajn kadrojn. Fan Zeĉian, antaŭa estro de la blankiga kaj tinktura laborejo kaj nun membro de la revolucia komitato de tiu laborejo, diris kun profunda sentimento: “En la pasinteco oni klopodis nur por plenumi la produktan taskon sed ne por revoluciigi la ideologion, kaj sekve la produkta tasko ne estis plenumita malgraŭ ĉia klopodo. Nun oni komandas la produktadon per la penso de Maŭ Zedong kaj iras la vojon de konstruo de la fabriko per politiko, la produktado senĉese plialtiĝas, la ideologio de la laborantoj ŝanĝiĝis kaj ankaŭ aliĝis la fizionomio de la fabriko.” La fakto estas ĝuste tia. La riĉa rikolto aperinta en la movado de teknika revolucio kaj teknika renovigo de tiu ĉi fabriko estas rezulto de la komando de produktado per la penso de Maŭ Zedong.

FIDELECO ESPRIMITA PER PENIKO

En la triumfaj kantoj de la teknika revolucio kaj teknika renovigo la laboristoj ankaŭ okupis la kampon de projektado de flordeseĝa ŝtofo.

Dum multaj jaroj, utiligante la kampon de desegno-projektado, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj reakciaj teknikaj “aŭtoritatoj” en tiu ĉi fabriko energie kreis kontraŭ-revolucian publikan opinion kaj kolportis la koruptiĝintan arton de feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo. Ekzemple, ili projektis la desegnojn de mandaren-anasoj kaj papilioj, kiuj prikantis amon, la desegnojn de feino disdonanta florojn kaj monero kun bondezir-signo, kiuj propagandis feŭdisman superstiĉon kaj prilaudis riĉecon kaj noblecon, por narkoti kaj korupti la animon de la homo. Pli netolerebla estis, ke plenmano da kontraŭrevoluciuloj, kiuj maskis sin “projektistoj”, utiligis la leĝan kampon de desegno-projektado por freneze ataki la socialisman sistemon, la tri ruĝajn flagojn kaj la grandan Ĉinan Popolan

Liberigan Armeon. Vizaĝe al tiuj okulfrapaj faktoj malkaŝitaj, la laboristoj ĉiuj estis plenaj de indigno kaj esprimis sian decidon: “Ni laborista klaso nepre devas teni en niaj propraj manoj la povon super la desegno-projektado.” En la alttajo de batalo, kritiko kaj reformo la kampo de desegno-projektado estis deprenita.

Kombinante sin kun la revoluciaj projektistoj, kun plena heroeco, la laboristoj svingis sian revolucian penikon kaj sub ĝi naskiĝis desegnoj unu post alia helkoloraj, kun revolucia enhavo kaj relative perfekta arta formo, kaj ŝatataj de la vasta amaso de laboristoj kaj kamparanoj. La unua desegno kun grandaj floroj “**Kiu ne atingos la Grandan Muron, tiu ne estos heroo**” esprimis la grandan spiriton de la ĉina laborista klaso armita per la penso de Maŭ Zedong, kiu ĵuras konduki la grandan proletaran kulturalan revolucion ĝis fino.

Kiam la ĝojiga novaĵo, ke nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ transdonis mangojn — la valora donaco de eksterlanda amiko — al la laboristaj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong de la ĉefurbo, venis al tiu ĉi fabriko, kun varmaj larmoj de feliĉo la maljunaj laboristoj Vang Zuoting,

Jen estas la silicia rektifa transformatoro kreita de laboristoj, kiu ebligas multe ŝpari elektron.





Angulo de la kontrolejo de produktaĵo

Liu Jinguj kaj aliaj ĵetis sin en la batalon projekti grandan flordeseĝnon “Mango” tuj en la nokto de la sama tago. Ŝi Hongŝeng, laboristo partoprenanta la projektadon, diris: “Ju pli la mango elstariĝas en la desegno, des pli profunde montriĝas la sincera sento de fideleco de ni laboristaro al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.”

Post intensa batalado en ses tagoj ili kaj la revoluciaj projektistoj sukcesigis sian projekton. Tuj poste ili projektis la grandan flordeseĝnon “La Komunikado de la Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Estas Klarigita al Marŝo por la Revolucia Popolo”. La desegno montras: inter heliantoj sub la matena suno, la dokumento, kiu brilas per la penso de Maŭ Zedong, lumigas la vastan teron de nia patrolando, kaj la ruĝa trumpeto, kiu klarigas la marŝon, eligas la plej fortan sonon de la epoko simbolante ke la tuta mondo jam eniris en novan epokon de granda revolucio.

Kiam aperis novaj produktoj kun la grandaj flordeseĝnoj plenaj de revolucia heroismo kaj revolucia optimismo de la ĉina laborista klaso kaj tiu novaĵo disvastiĝis, en la tuta fabriko ekbolis ĝojaj

krioj. Tio multe plialtigis la aspiron de la laborista klaso kaj malpliigis la arogantecon de plenmano da klasaj malamikoj. Iu “inĝeniero”, kiu disfamiĝis kiel veterano kun kelkdekjara sperto pri desegno-projektado, staris antaŭ la ŝtofo kun grandaj flor-deseĝnoj projektitaj de la laboristoj kaj kaptis fojon post fojo por esprimi sian admiron.

Tuj post kiam la laboristoj ascendis la scenejon de projektado, ili alportis novan fizionomion al la desegno-projektado en la tuta fabriko kaj montris eksterordinaran artan kapablon. Estas tute sendube, ke pli belaj kaj pli novaj desegnoj kun trajtoj de socialismo naskiĝos sub la peniko de la laboristoj.

La revoluciigo de tiu ĉi pres-tinktura fabriko plene vidigas, ke la ĉina laborista klaso armita per la penso de Maŭ Zedong certe povas gvidi kaj plenumi la glorajn historiajn taskojn de batalo, kritiko kaj reformo en diversaj kampoj de la superstrukturo de diversaj etapoj.

* “Du multaj”: multaj tavoloj kaj multaj finoj;

** “Tri igoj”: mekanikigo, aŭtomatigo kaj kontinuigo;

*** “Kvar altaj”: alta temperaturo, alta premo, alta rapideco kaj alta efiko.

Propaganda Taĉmento de la Penso de Maŭ Zedong Formita el Ruĝaj Soldatetoj



Majstro Lej de Laborista Propaganda Taĉmento de la Penso de Maŭ Zedong instigas la ruĝajn soldatetojn kreive studi kaj kreive apliki la penson de Maŭ Zedong por fariĝi daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro.



La propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong formita el ruĝaj soldatetoj de la elementa lernejo "7 Majo" de la Ŝigiaguang-a Vitra Fabriko en marŝado.

Propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong formita el ruĝaj soldatetoj propagandas la penson de Maŭ Zedong al maljunaj laboristoj en iliaj familioj.



La Propaganda taĉmento faras prezentadon sur strato.



Gestkantado "Ruĝaj Soldatetoj Ĉiam Fideblas al Prezidanto Maŭ"

Studi la brilan verkon de Prezidanto Maŭ "Memore al Norman Bethune" antaŭ la maŭzoleo de la granda internaciisma batalanto N. Bethune.



Nova Printempo en Malnova Minejo

GINGHING-karbominejo estas malnova minejo situanta sub Tajhang-montaro kaj ĉe la bordo de Mian-rivero, kiu havas historion de 68 jaroj, kaj antaŭ la granda kultura revolucio la minejo falis jam en ruinan staton kaj kies produktkvanto ĉiam plimalaltiĝis pro fuŝado de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" de la minejo.


Kiel printempa tondro kaj la ruĝa suno, la granda proletara kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ skuas la patrolandon kaj lumigas la tutan minejon. Dank' al la brila penso de Maŭ Zedong kaj la intensa lukto inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, tiu ĉi baldaŭ ruiniĝonta minejo reviviĝis, rejuniĝis kaj akiris denove la socialisman junecon.

DE MORTO AL VIVO

Ginghing-karbominejo estis minejo antaŭlonge kondamnita al "morto" fare de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj". Jam de la jaro 1962 ili komencis fari finan laboron. Kaj eĉ post la komenciĝo de la granda proletara kultura revolucio, ili ĉie disemis: "Ginghing-minejo kliniĝas

jam al maljuneco. Oni nenion akiros de ĝi kaj devas fini la laboron." Kial ili tiel haste kondamnis ĝin al "morto"? La kaŭzo kuŝas en tio, ke en la pasinteco, ili praktikis nigrajn reviziismajn indikojn kiaj "rampismo", sklaveco antaŭ fremduloj, "profito en komando" k. a. distrustemigitaj de renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj komplicoj, ke ili senplane ekspluatis kaj zorgis nur karbovejnoj bonajn ignorante la malpli bonajn, tiel ke granda nombro da bonaj minejoj estis detruita. Post la komenciĝo de la granda proletara kultura revolucio ili forte timis ke siaj krimoj en detruo de karba riĉfonto de la patrolando estos malkovritaj, tial ili intencis enterigi la krimojn per translokigo. Tiujn krimojn la ministoj devas firme malkaŝi.

En la suda parto de Baŭ-an-tunelo, troviĝis galerio fermita de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" sub la preteksto ke en ĝi ne estas karbo. Ĉu vere ne estas karbo en ĝi? Sub la subteno de la PLA-anoj, la laboristoj de 151-fosgrupo malfermis la fermitan galerion. La laboristoj trovis ke en ĝi karbo ne nur ekzistas sed ankaŭ estas grandkvanta. Ili do decidis daŭrigi la fosadon.



Laboristoj de Ginging-karbominejo deziras longan longan vivon al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Kiam ili fosis pli ol 50 metrojn, iu burĝara teknika “aŭtoritatulo”, trovinte ke lia krimo baldaŭ estos malkaŝita, haste diris kun “zorga” tono: “Fronte jam estas parto disfala, tre danĝera, vi ne fosu pluen!” Tiam veterana maljuna majstro Du demandis: “Kial do ĝia grundo ne fendigâs kaj la plafono ne disrompiĝas?” Tio mutigis la “aŭtoritatulon”. Silentinte momenton, li disvolvis projektajn paperojn kaj diris: “Jen vidu, sur la projektaj paperoj de germanoj kaj japanoj ja estas signitaj ke ekster la sekura linio estas malpermesita loko disfala. Ne kredi al ĉi tiuj materialoj signifas ne kredi al scienco!” Tion aŭdinte, veterana laboristo Ĝu Juhaj diris firmdecide: “Ni ja ne kredas la projektajn paperojn de fremduloj, sed kredas la praktikon de la ĉinaj laboristoj!”

Konkerinte la tiel nomatan malpermesitan lokon difinitan de la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”, la laboristoj daŭrigis la fosadon. Ili faris intensajn batalojn unu post alia kontraŭ la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”, venkis malfacilojn unu

post alia sur la antaŭenmarŝa vojo. Komandante ĉion per la penso de Maŭ Zedong, la laboristoj de la tuta minejo firme kondukis klasan batalon kaj la batalon inter la du linioj. La laboristoj unuvoĉe esprimas: “Ju pli multe da karbo ni trovos, des pli multe da kontribuo ni faros al defendo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!” Jen la amasa movado de karbosercado rapide leviĝis tra la tuta minejo. En mallonga tempo de unu jaro, la laboristoj trovis pli ol dek milionojn da tunoj da karbo por la ŝtato, kaj je pli ol 20 jaroj longigis la vivon de la minejo, kiu estis kondamnita al “morto” fare de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”.

DE NENIO ĜIS NOVA ŜAKTO

Sub Mian-rivero troviĝas larĝa karbejo bonkvalita. Tamen, dum kelkdek jaroj neniu kuraĝis ĝin ekspluati pro ĝia subrivera situo.

Je la komenco de la granda proletara kultura revolucio, kun senlima amo al la granda gvidanto

Prezidanto Maŭ kaj alta respondecemo al socialisma konstruado, la revoluciaj laboristoj plurfoje proponis ekspluati tiun ĉi karbejon. Kaj sub la forta petado de la laboristoj, ankaŭ la burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" gvidis la konstruadon de du ŝaktoj, sed malsukcesis. El tio ili konkludis, ke neniu sukcesos ekspluati tiean karbon pro torenta rivero, grandkvanta leŭso kaj komplika geologio. Tion aŭdinte, la laboristoj tuj refutis: "Se ne estas kondiĉo, ni ĝin kreos; se ne estas rimedoj, ni ilin elpensis. Kaj ekspluati karbon sub la riveron ni jam decidis!"

La revolucia komitato kaj PLA-a propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong firme subtenis ĉi tiun revolucionan iniciaton de la laboristoj kaj decidis organizi batalon gajni karbon el sub la rivero. Informiĝinte pri tio, la laboristoj ĉiuj estis ĝojigitaj kaj inspiritaj. Kun revolucia sentimento "gajni gloron por Prezidanto Maŭ kaj la ĉinaj ministoj", ili konkure petis partopreni tiun ĉi batalon. Kaj venka grupo formita el pli ol cent revoluciaj minis-

toj kantonmentis sur la suda bordo de Mian-rivero kaj komencis la batalon gajni karbon el sub la rivero.

Kiam ili fosos 40 metrojn en ŝakto, ili renkontis maloftan ŝliman movsablon. En tiu ĉi malfacila momento, la PLA-a propaganda taĉmento kaj respondeculoj de la revolucia komitato persone venis al la loko kaj komandis la batalon per la penso de Maŭ Zedong. Ili organizis ĉiujn ripetade studi la instruojn de Prezidanto Maŭ: "Ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi paŝon post paŝo post la aliaj. Ni nepre devas rompi la rutinojn kaj plejeble apliki progresintajn tenikojn." "Sur kian bazon ni metas nian politikon? Metu ĝin sur la bazon de niaj propraj fortoj, nome: 'sinapogo sur propraj fortoj.'" Post forta kritiko kontraŭ "rampismo" kaj sklaveco antaŭ fremduloj, distrustpetitaj de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, tiel aperis arda tajdo "ĉiuj cerbumas, ĉiuj proponas". Iun tagon, maljuna laboristo Kang Ĝiting estis revenanta hejmen kaj vidis survoje, ke montregionaj

Sub komando de la revolucio, revoluciaj laboristoj kaj ofcistoj de Ginghing-karbominejo forte stimulas produkton.



kampanoj konstruas kanaleton penetrigante betonajn tubojn tra trakbazon. Li pensis: "Ĉu oni ankaŭ povas trairi la ŝliman movsablaron per tia rimedo? Tion pensante, li tuj revenis al la minejo kaj elmetis tian proponon al la revolucia komitato. Post diskutado la revolucia komitato akceptis lian proponon kaj komenciĝis eksperimentado.

Post 16-tagnokta peniga luktado la revoluciaj ministroj venke trairis je 30 metroj dikan ŝliman movsablaron tavolon kaj finkonstruis novan ŝakton sub Mian-rivero. Tio plene montris la revolucionan spiriton de la ministroj armitaj per la penso de Maŭ Zedong kuraĝi batali kontraŭ la ĉielo kaj la tero.

FORIGI MALNOVAN POR NOVA

Antaŭ la granda proletara kultura revolucio, Ginging-karbo minejo ĉiam uzis malnovan metodon de "normala cirkula" karboekspluatado. Tia metodo estas metodo de malmulteco, malrapideco, malboneco kaj malŝpareco. Ĝi serioze sufokis homan aktivecon en produktado kaj malhelpis disvolviĝon de produkta forto. El siaj praktikoj la laboristoj profunde komprenis, ke estas necese aboli la malnovan metodon, se oni volas bone efektiviĝi la grandan principon de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion kaj stimuli la produkton".

En kunsido por "teni la revolucion kaj stimuli la produkton" kunvokita de la revolucia komitato, veterana laboristo Ĝeng Kianlaj elmetis laŭ sia multjara sperto revolucionan proponon forigi la malnovan metodon de "normala cirkula" karboekspluatado, kiu tuj ricevis varman subtenon de plejparto de la kamaradoj. Sed ankaŭ estis malaprobantoj. Ili diris: "La nuna karboekspluata metodo estas la plej avangarda kaj plej scienca en la mondo kaj neniel devas esti forigita!" Tion aŭdinte, la laboristoj ĉiuj refutis: "Kial 'neniel devas esti forigita'? Ni nepre forigos ĉion ajn malnovan, malhelpantan disvolviĝon de produkta forto!"

La laboristoj sur la 201-a labortereno kuraĝe abolis la malnovan metodon kaj adoptis la novan. Post kiam la nova metodo estis disvastigita tra la tuta minejo, ĝi multe stimulis produkton. En 1968, la ŝtataj planoj de produktkvanto de karbo kaj fosita longeco en la tuta minejo antaŭdate plenumiĝis respektive je 71 kaj 119 tagoj.

Sub la sunbrilo de la penso de Maŭ Zedong la malnova minejo venis en sian novan printempon.

HIANG JANG:

Ni Mem

AGANTE laŭ la granda instruo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ sin apogi sur la propraj fortoj, peneme batali kontraŭ la malfaciloj, elimini superstiĉojn kaj liberigi la penson, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Hiangjang-a Fabriko de Petrolaj Produktaĵoj de Ginan iris la ĉinan propran vojon en disvolvo de industrio kaj altrapide kaj altkvalite konstruis modernan laborejon por produkto de epiklorohidrino. De nun, ni jam povas mem produkti epiklorohidrinon, la gravan organikan sintezan materialon por kemia industrio, kiun ni ĉiam devis importi en la pasinteco.

Epiklorohidrino estas necesa kaj grava organika sinteza materialo en kemia industrio por fabriki sintezan rezinon, glicerinon ktp, kaj estas vaste uzata en nacidefenda industrio. En la pasinteco, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj en la kemiindustria departemento irantaj la kapitalisman vojon provis ĝin fabriki sin apogante nur sur malmultaj entreprenoj rekte sub ilia gvidado kaj superstiĉe kredante fremdulojn kaj specialistojn, sed el ilia dekelk-jara provado rezultigis nenio kaj ĉiujare oni devis importi tiun materialon. En la jaro 1966, laŭ la urĝa bezono de la ŝtato, la Kemi-industria Ministerio proponis, ke koncerna industrio de Ŝandong-provinco aranĝu produktadon de epiklorohidrino. Opiniante, ke produktado de tiu materialo povas alporti grandan profiton, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de Hiangjang-a Fabriko de Petrolaj Produktaĵoj akceptis la taskon; sed post pli ol duonjaro, ili sukcesis pretigi neniun ekipaĵon.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: "Ni pledas por sinapogo sur propraj fortoj. Ni esperas ricevi eksterajn helpojn, sed ni ne devas dependi de ili. Ni apogas nin sur niaj propraj klopodoj kaj sur la kreivo de nia tuta armeo kaj nia tuta popolo." En

Sukcesis Produkti

Epiklorohidrinon

la granda proletara kultura revolucio, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la fabriko armis sian kapon per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, tiel ke la saĝo, talento kaj senfina kreivo de la laboristaj amasoj erupcie elŝprucis. Ili faris firman decidon fabriki epiklorohidrinon.

Por konstrui laborejon de epiklorohidrinon necesas pli ol 90 fikstipaj instrumentoj kaj krome ankaŭ granda nombro da nefikstipaj instrumentoj. Kion fari? La revolucia komitato de tiu fabriko mobilizis la amasojn kaj disvolvis varman diskutadon. Ĉiuj opiniis unuanime, ke oni devas sin apogi sur la propraj fortoj kaj ne devas postuli ekipaĵon de la ŝtato. La laboristoj diris: “La ŝtato havas multegon da konstruaj taskoj, tial ni ne devas etendi manojn al ĝi sed devas alpreni la plej aktivan rimedon, nome fari per niaj propraj manoj.” Kaj sekve, ili komencis konstrui ekipaĵon kaj domojn por la fabriko, havante nek bluplanojn, nek sufiĉajn materialon kaj instrumentojn.

Dum fabrikado de ekipaĵo, ili organizis teknikan grupon de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la ĉefa parto, kaj komencis samtempe diskutadi, projektadi, fabrikadi kaj plibonigadi. En la pasinteco, grandaj konservujoj de propileno estis produktataj sole de grandaj fabrikoj por kemiindustriaj ekipaĵoj. Kiam la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de tiu ĉi fabriko proponis tion fabriki per si mem, iuj diris: “Por fari tion, eble oni ne povas veldi ŝtalajn platojn 20-milimetrojn dikajn, se oni ne havas necesan ekipaĵon kaj altkvalitajn veldstangetojn.” La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj diris brave: “Se tio estas necesa por produkto de epiklorohidrinon, ni do nepre ilin veldos.” Ne havante premfermilon en fabrikado de tia konservujo, la laboristoj do batadis per ligna martelo; ĉar ili ne havis elektran veldilon, ili do mem tion

fabrikis; ne havante pneŭmatikan ŝovelilon, ili do glatigis per ĉizilo kaj smirgpapero; ne havante altkvalitajn veldstangetojn, ili do veldis dufoje per ordinaraj. Tiamaniere, ili rapide pretigis du 50-tunajn konservujojn de tute laŭnorma kvalito.

La procezo de produktado de epiklorohidrinon estas longa, kun multaj kemiaj reakcioj kaj interproduktoj kaj forta kontinueco. La manipula tekniko estas relative komplika. Pli ol duono de la laboristoj de tiu fabriko devenis de dommastrinoj kun malalta tekniko, sed ili ne submetiĝis al la malfaciloj. Por mastri la manipulan teknikon, ili diligente lernis en praktikado manipulante instrumentojn kune kun teknikistoj. Foje dum provfunkciigo de la ekipaĵo, kloro ellasiĝis el la konduka tubo. Se oni ne ĉesigos tion ĝustatempe, la temperaturo en la reakcia turo abrupte altiĝos kaj la turo de hipoklorika acido eksplodos. En tiu kriza momento, ili persistis daŭrigi la funkciigadon kaj ĉiuj sindoneme kuris al la loko por urĝa savo, laŭte deklamante la vortojn de Prezidanto Maŭ: **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.”** La forte venena kloro ŝveligis kaj larmigis iliajn okulojn, kaj iuj el ili kapturiniĝis kaj vomis, sed neniu volis forlasi la “batalfronton”. Per la heroa batalado, fine ili haltigis la elŝprucadon kaj malbbligis okazon de incidento. Dum sia batalado, la laboristoj iom post iom mastris la manipulan teknikon.

Ĝuste tiamaniere, sub la gvido de la penso de Maŭ Zedong, dank’ al la tagnokta luktado de ĉiuj oficistoj kaj laboristoj dum pli ol unu jaro, tiu ĉi malgranda fabriko kun nur iom pli ol cent homoj venkis malfacilojn unuj post aliaj kaj fine komencis regulan produktadon de epiklorohidrinon.



Nova Fizionomio de Porcelana Urbo

GIANG ĜEN


PAROLANTE pri porcelanaĵoj de Ĉinio, oni nature pensas pri la porcelana urbo Gingdeĝen.

Gingdeĝen situas en la nordoriento de Gianghi, kie la montoj kaj akvoj estas tre belaj. La porcelanaĵoj tie produktataj estas bonkvalitaj kaj kolorriĉaj kaj fame konataj delonge en kaj ekster nia lando. En la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio, Gingdeĝen travivis profundan revolucionan ŝanĝiĝon, vicoj kaj vicoj da nove produktitaj porcelanaĵoj kun revoluciaj desegnoj ricevas bonan akcepton ĉe la enlandaj kaj eksterlandaj revoluciaj popolamasoj.

Laŭdire Gingdeĝen jam frue komencis produkti porcelanaĵojn antaŭ pli ol 1,400 jaroj. Sed, sub

la kruela prirabado de la pasintaj feŭdaj regantoj, precipe de tiuj en la lastaj cent jaroj kaj de la kuomintanga reakcia registaro, granda nombro da porcelanaj laboristoj perdis laboron kaj vivrimedon, ankaŭ la produkto trafis seriozan baton, multaj porcelanaj fornoj fariĝis malvarmaj kaj kadukaj, kaj la produkto preskaŭ ĉesis.

Nur post la Liberiĝo Gingdeĝen akiris novan vivon. Sub la zorgo de la Partio, la porcelana fornaro de Gingdeĝen ne nur refunkciis plene, sed ankaŭ rapide disvolviĝis. La granda ŝanĝiĝo en la okcidenta antaŭurbo de Gingdeĝen estas okulfrapa ekzemplo. Antaŭ la Liberiĝo, tie kreskis densaj herboj kaj nestis sovaĝaj bestoj. Dum



la pasintaj pli ol dek jaroj post la Liberiĝo, sur la sovaĝejo konstruiĝis unu post alia modernaj porcelanaj fabrikoj kaj fabrikoj de kemiaĵoj, porcelana argilo, maŝinoj, skatoloj, fajrorezistaj objektoj k.a, kiuj servas al la porcelana produkto. Proksime de la fabrikoj aperis unu post alia novaj laboristaj loĝdomoj. Larĝaj asfaltaj ŝoseoj ligas tiujn fabrikojn kun la loĝkvartaloj. Ĉiutage kamionoj plene ŝarĝitaj per krudaj materialoj aŭ novaj produktaĵoj kuras kiel navedoj. En la nova industria kvartalo ĉie regas prospereco.

La porcelanaj fornoj de Gingdeĝen, kiuj havas kompare longan historion, situas dise en ĝia centra kvartalo. Tiuj fornoj antaŭe estis memstaraj privataj metiejoj. Ĝis la komenca periodo post la Liberiĝo, ili ankoraŭ uzis teknikon sufiĉe primitivan, hereditan de mil jaroj: Formigado estis plenumata per manoj, kaj knedado per homforto; sekigo dankis al la suno kaj bakado al bruligno. Post la plenumo de socialisma transformo de la privataj industriaj kaj komercaj entreprenoj en nia lando, la porcelanaj laboristoj subpremataj kaj ekspluatataj en la pasinteco nun fariĝis veraj mastroj de la fabrikoj. Sub la gvido de la Partio, kun alta revolucia entuziasmo ili rompis miljarajn

rutinojn, kuraĝe faris revolucion kaj renovigojn en tekniko kaj rapide levis la produktan nivelon. Ekzemple, la plej peza laboro en la porcelana produkto en la pasinteco — forigo de senutilaĵo el porcelana argilo jam estis mekanikigita. Formigaj maŝinoj ekfunkcias je ektuŝo de ŝaltilo kaj en kelkaj sekundoj ili aliformas argilbulojn en diversformajn objektojn; tia formigado estas kvinoble pli rapida ol manlaboro. Krome, la malnovaj fornoj estis anstataŭitaj per tunelformaj fornoj, kiuj ebligas kontinuan produktadon. Por sekigi argilajn formigitaĵojn oni nun uzas tiucelajn maŝinojn. En kolora pentrado kaj glazurado oni nun havas specialajn maŝinojn por glazuri kaj ŝpruc-desegni, kaj ankaŭ aplikas la novan teknikon de transigo de desegno per plasta membrano. Aplikado de tiuj novaj teknikoj multe reduktis la streĉecon de laboro kaj altigis produktivecon, tiel ke ankaŭ la kvalito de produktaĵoj leviĝas senĉese kaj iliaj specoj plimultiĝas rapide. Laŭ statistiko la tieaj porcelanaj produktaĵoj jam atingis pli ol mil specojn.

La porcelanaĵoj de Gingdeĝen jam atingis tre altan nivelon en delikateco kaj beleco. Oni resumas iliajn karakterizaĵojn laŭde per la jenaj vortoj:

EKSPOZICIO DE ĈINAJ MEDIKAMENTOJ KAJ MEDICINAJ APARATOJ EN HONGKONG

La ekspozicio de ĉinaj medikamentoj kaj medicinaj aparatoj estis okazigita en Hongkong, daŭris unu monaton kaj fermiĝis en la 10-a de februaro. Ĝi ricevis varman bonvenigon flanke de niaj samlandanoj en Hongkong kaj transmaraj ĉinoj. 140,000 personoj vizitis ĝin.

Ĉe la enirejo de la halo staris statuo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj montriĝis la eldiroj de Prezidanto Maŭ: **“Meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kampanon”** kaj **“Savi mortantojn kaj helpi vunditojn, efektiviĝi revolucion humanismon”**.

Ekspozitaj estis elektronaj medicinaj aparatoj, hospitalaj ekipaĵoj, rentgen-radiaj ekipaĵoj, buŝaj ĥirurgiaj ekipaĵoj, fundamentaj ĥirurgiaj instrumentoj, akupunkturaj kaj kaŭterizaj aparatoj, krudaj medikamentaj materialoj, tradiciaj ĉinaj medikamentoj, modernaj medikamentoj, ktp. Montrita estis ankaŭ vitra figuro, kiu klarigis la tradician ĉinan medicinan teorion de meridianoj — pasejoj aŭ kanaloj al kiuj cirkulas la sango kaj viv-energio — kaj konigis, kiel tia cirkulado rilatas al la internaj organoj. La vizitantoj opiniis, ke kvankam la ekspozitaĵoj konsistigis nur malgrandan parton de la medicinaj aparatoj kaj medikamentoj produktitaj de la patrio, tamen tio jam vidigis la avangardan nivelon, kiun atingis la kurac-laboro kaj medikamenta industrio de Ĉinio.

GRANDA MODERNA ŜAKTO DE HINGIANG

Granda moderna karboŝakto, ŝakto n-ro 1 de Hingiang de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kun jara produktivo de kelkcent mil tunoj da karbo, projektita kaj konstruita de ni mem, jam komencis produkton.

La konstruado de la ŝakto trapasis intensan batalon inter la du klasoj, inter la du vojoj kaj inter la du linioj. Komence, Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la minejo ĉasis “grandecon” kaj “fremdlandan normon”, poste sub diversaj pretekstoj ili sin turnis al senbrida obstrukco kontraŭ la konstruo de la ŝakto. Sed la vastaj amasoj de diversnaciaj oficistoj kaj laboristoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong kun ardanta revolucia entuziasmo frakasis la subfosan intrigon de la klasaj malamikoj kaj akiris grandan venkon en la konstruado de la ŝakto.

“blankaj kiel lakto, sonantaj kiel tintilo, maldikaj kiel papero kaj brilaj kiel spegulo”. Tre variaj estas la formoj de porcelanaĵoj de Gingdeĝen, kiuj estas delikataj kaj bongustaj kun kompakta, solida substanco. Kaj kun belaj kaj kolorriĉaj desegnoj, ili estas ne nur taŭgaj por uzo, sed ankaŭ tre bonaj artaĵoj. La bovloj kaj teleroj de Gingdeĝen kun blua desegno kaj diafanaj punktoj estas speco de tradiciaj produktaĵoj fame konataj en kaj ekster nia lando. Tiaj produktaĵoj heredis la teknikon de subglazura desegno en bluo el Ming-dinastio kaj estas faritaj laŭ la jena procedo: unue fari bluan desegnon kaj malgrandajn truetojn sur la nebakitaj produktaĵoj kaj poste ŝmiri ilin per glazuro, kiu kovras la truetojn, antaŭ ol esti bakitaj. Prenante tiajn produktaĵojn kontraŭ lumo, oni povas vidi sur ili diafanajn punktojn, kiuj formas ian desegnon, kiu kune kun subglazura blua desegno faras la produktaĵojn aparte belaj kaj graciaj. Tiaj produktaĵoj distingiĝas cetere per pli malrapida disradiado de varmo. En komparo kun alispeca bovlo, kiam la kuirita rizo metita en tian bovlon ankoraŭ estas iom varmeta, tiu en alispeca bovlo jam estas tute malvarma.

La kolorriĉaj porcelanaĵoj de Gingdeĝen estas kristalo de la saĝo de nia laboranta popolo. Post la Liberiĝo, plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon propagandis imperiestrojn, reĝojn, generalojn, ministrojn, dandojn kaj belulinojn, utiligante la desegnojn de porcelanaĵoj por fari preparon de publika opinio por restaŭri kapitalismon. En la granda proletara kultura revolucio, prenante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj forte kritikis la reviziisman linion antaŭenpuŝatan de Liu Ŝaŭki, projektis kun zorga konscienco kaj produktis grandkvante porcelanaĵojn uzatajn en ĉiutaga vivo, higieno, industrio kaj nacidefendo, kiujn urĝe bezonas nia lando. En la desegnaĵoj sur porcelanaĵoj, estas tute forbalaitaj malnovaj bildoj kaj ilin anstataŭis tute novaj bildoj kun revolucia enhavo. Tio ricevis varman aprobon de la vastaj laboristaj, kampanaj kaj soldataj amasoj.

La porcelanaĵoj de Gingdeĝen vaste vendiĝas ne nur tra la urboj kaj vilaĝoj de nia lando, sed ankaŭ en diversaj malproksimaj landoj en la mondo. Dum la pasintaj pli ol dek jaroj, la kvanto de eksportitaj porcelanaĵoj kreskis jaron post jaro, la ĉefaj merkatoj por eksporto estis Hongkong kaj Aŭmen. Nun pli ol 60 landoj kaj regionoj de ses kontinentoj de la mondo jam mendas ilin en grandaj kvantoj kaj la eksporta kvanto jam atingis trioblon de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.



Notoj pri la Marĉa Herbejo

HINGHUO

BASTONO

En somero de 1935, sub la eminenta gvido de Prezidanto Maŭ nia Ĉina Laborist-kampana Ruĝa Armeo atingis Maheba ĉe rando de la Marĉa Herbejo, frakasinte la persekutadon, baradon kaj sieĝadon de kuomintangaj banditaj trupoj el centmiloj da militistoj, venkinte plej diversajn malfacilojn. Pro troa laciĝo kaj neceso sin prepari por marŝado en la Marĉa Herbejo la trupoj haltis tie tri tagojn. Antaŭ ekmarŝo la divizio faris ordonon pri preparo al marŝado en kiu estis postulo, ke ĉiu provizu sin per longa bastono. Ĉiuj kamaradoj kompreneble plenumis la ordonon.

Kvankam la utilo de bastonoj estis klarigita en la ordono de la divizio, tamen tio ne trovis sufiĉan atenton ĉe ni. Tial, dum la marŝo en la unua tago multaj bastonoj estis jam difektitaj. Ankoraŭ iuj rigardis la longan bastonon superflua ŝarĝo apud la fusilo, pakaĵo kaj manĝsako kaj simple forjetis ĝin.

Iun tagon, ni venis al senlima herbejo transgrimpinte altan monton. En la antaŭtagmezo, la vetero

ankoraŭ estis tre bona, sed subite pluvegis tagmeze. La vestoj kaj tornistroj de ĉiuj batalantoj estis tramalsekigitaj. Antaŭ la vespero, la regimento jam donis ordonon por kampado. La ordono postulis ke ni rapide trovu lokon altan kaj por akvo neatingeblan kaj starigu tendojn per niaj littukoj kaj portataj bastonoj kontraŭ ebla atako de forta pluvo kaj hajlo. Tio embarasis tiujn, kiuj forjetis siajn bastonojn. En tiu punkto nemalmultaj kamaradoj, kiuj ne povis starigi tendojn, embarase tranoktis sub forta pluvo kaj hajlo. Kun paso de la tagoj la batalantoj jam konis el personaj spertoj la utilon de bastonoj, kaj plimultiĝis bastonoj tagon post tago kaj estis kreive uzataj.

Bastonoj estis uzataj por starigi tendojn. Laŭ longeco de bastonoj kaj larĝeco de littukoj ĉiuj subpontonj dividiĝis en grupojn el 3-5 homoj. Ĉiuj grupoj rapide starigis siajn tendojn tuj atinginte lokon por tranoktado.

Bastonoj estis ankaŭ uzataj por fari pluvombrelojn. Somere en la Marĉa Herbejo, apero de nuboj

antaŭsignas pluvon. Tiam, escepte de tre malmultaj kamaradoj, kiuj havis bambuajn ĉapelojn, al la plejparto mankis kontraŭpluvaj iloj. Por ŝirmi nin kontraŭ pluvo, ni alligis du branĉojn krucigitajn sur baston-ekstremito kaj poste fiksis kvadratan tolon sur la krucon por uzi tion kiel pluvombrelon."

Bastonoj estis uzataj plie kiel irbastonoj sur la vojo. Sur Marĉa Herbejo troviĝas kavoj kaj sulkoj kovritaj de verdaj herbaĵoj ŝajne tre mallarĝaj kaj facile transpaŝeblaj, sed fakte tre larĝaj kaj tre profundaj. Ili povas englutiti ĉiun enfalinton. Tiam bastonoj estis uzataj por palpi vojon kaj sondi la profundecon de akvo kaj ebligis al la kamaradoj eviti danĝeron kaj intensan laciĝon.

Sur herbejo, ĉie estas marĉoj kun tero tiel mola kiel kaŭĉuko. Dum marŝado ĉiu, kiu malatente paŝis, tuj dronis en ŝlimon kaj ne povis facile reeltiri siajn piedojn. Kaj ju pli oni baraktis, des pli la piedoj enprofundiĝis. Se iu alia klopodis lin eltiri, ankaŭ tiu povis trafi la saman sorton. Kion fari? Nur stari sur kompare solida loko

kaj etendi la bastonon al la mispaŝinto, kaj nur tiamaniere oni povis lin eltiri. Je tia okazo bastono estis nia vera savzono. Kiam la bastono fariĝis nemalhavebla objekto en la vivo de nia ruĝa armeo, jam neniu ĝin plu forĵetis. Multaj kamaradoj eĉ portis ĝin kun si ĝis la Norda Ŝenhi kaj ne volis ĝin forĵeti. Ĉar ĝi akompanis nin trapasi malfacilan vojon kiel kunbatalanto, kiu dividis kun ni malfacilojn kaj suferojn. Kiel oni povis forlasi tian amikon?

TAMBURA LEDO

Dum la Longa Marŝo, kiam ni ripozis iun tagon antaŭ templo de monta dio, mi subite vidis ĉe murpiedo truan tamburan ledon kun grandeco de bambua ĉapelo, plene kovritan de polvo kaj videble forĵetitan, mi do prenis ĝin. Kiam ni rekomencis la marŝadon, la subplotonestro, vidinte la ledon, demandis min: “Por kio vi ĝin kunportas?” Surmetinte la ledon sur mian kapon mi ŝercis: “Mi uzos ĝin kiel bambuan ĉapelon!” Aŭdinte mian respondon, la tuta subplotono priridis min ke mi mem ŝarĝis min per balasto. Por kio porti tiun senutilaĵon dum longa militiro? Ilia rido ja estis natura, tiam ankaŭ mi mem ne antaŭvidis ke ĝi donos en la posta tempo al mi tiel grandajn helpojn. Tagoj pasis, nia situacio fariĝis ĉiam pli malfacila. Tutajn tagojn ni marŝis sur grandaj montoj kaj en profundaj valoj; en unu tago ni devis travivi kvar sezonojn: Ĉe montpiedo la suno kvazaŭ brulis sur niaj kapoj, tiel ke ni anhelis kun malfermita buŝo.

Sed sur la montsupro estis arĝenta mondo kovrita de neĝo profunda je kelkaj futoj, kie blovis frosta vento, kaj falis hajleroj grandaj kiel kaŝtanoj tiel ke oni eĉ ne sciis kien kaŝisian kapon. Dum tiuj tagoj mi ŝuldis multon al la tambura led: Ĉe montpiedo mi ŝirmis min per ĝi de la suno kaj ĉe montsupro — de hajloj.

Enirinte la Marĉan Herbejon la trupoj ĉiutage marŝis sur tero saturita de akvo, kiu ŝmacis sub niaj piedoj. Pro daŭra trempado en akvo, la sandaloj ŝvelpremis niajn piedojn kaŭzante al ili multajn sangvezikojn, kiuj pisis post tempo en malpura akvo. Tial, dum paŭzo en marŝado ĉiu deziris bone ripozi. Sed ĉie sur la herbejo estis ŝlimo kaj akvo. Kien oni povus sidiĝi? Tiam denove elmontris sian utilecon la tambura led nepenetrebla de akvo, sur kiu mi sidis kvazaŭ sur mola sofo.

Niaj ŝuoj difektiĝis de daŭraj trempado en akvo kaj uzado kaj multaj kamaradoj iris nur nudpiede. Dornejo kaj pintaj ŝtonoj vundis iliajn piedojn, kiuj kun puso kaj sango forte doloris al ili je ĉiu paŝo. Tiam la subplotonestro elprenis sian solan subŝtofitan litkovrilon, kiu estis ankaŭ la unika en la tuta subplotono, dispecigis kaj disdonis ĝin al la kamaradoj por vindi la piedojn. Sed pro nesufiĉo mi kaj alia kamarado ricevis nenion. Tiam, mi denove ekpensis pri la tambura led kaj diris: “Nu, ni faru ledŝuojn!” Tuj ni ambaŭ eklaboris, unu faris piktruojn kaj la alia kunkudris. Baldaŭ du paroj da “ledŝuoj” jam estis pretaj. Surmetinte ilin sur la pie-

dojn mi trovis, ke ili estas eĉ pli bonaj ol veraj ledŝuoj!

Kun paso de la tagoj, manĝaĵoj fariĝis ĉiam pli malmultaj. Formanĝinte grenon ni komencis manĝi ĉevalojn, formanĝinte ĉevalojn ni komencis manĝi sovaĝajn legomojn, poste eĉ tion ni jam ne povis trovi, tiam ni ekmanĝis ledzonojn. Kiam ankaŭ tiuj estis formanĝitaj, ni povis nur piediri kun malplena stomako. Iun tagon ni venis al piedo de alta monto kaj tie kampadis. Kiel ni povus transgrimpi la monton en nia tiama korpa stato, se ni manĝus nenion? Tiam mi ekpensis pri la “ledŝuoj” sur miaj piedoj: Ni manĝis ledzonojn, ĉu ni ne povas manĝi ankaŭ tamburan ledon? Mi tuj kolektis plenbrakon da sekaj branĉoj, faris fajron kaj sur ĝin metis la “ledŝuojn”. Tiuj krakis en la fajro kaj altiris ĉiujn niajn kamaradojn. La kamarado, kiu faris ŝuojn kune kun mi, ankaŭ ĵetis siajn “ledŝuojn” en la fajron. Post momento ni elprenis la ŝuojn, lavis ilin en akvo kaj skrapis ilin per tranĉilo. Poste ni kuiris ilin en lavkuvo. Post kuirado en bolanta akvo, la ledo fariĝis kaj flava kaj mola kaj eligis senĉese apetitan aromon. Post kuirado nia subplotonestro tranĉis ilin en malgrandajn pecojn kaj dividis ilin inter la kamaradoj de nia subplotono kiel manĝaĵon prenotan antaŭ la montgrimpado en la sekvonta tago.

Estis jam profunda nokto, kaj la kamaradoj ĉiuj estis en sonĝo, tamen mi neniel povis endormiĝi, ĉar mi pensis en mi: De la antikveco ĝis nun, kie en la mondo oni povis trovi tian trupon kia la Ruĝa Armeo, kiu povas venki ĉian ajn malfacilon?

Vigle Disvolviĝas

Studenta


Movado en Japanio

LA progresema studenta movado en Japanio ruliĝas antaŭen kiel oceanaj ondoj.

En la komenco de la kuranta jaro la progresema studentoj en Tokio jam levis novan altan tajdon en sia batalo kontraŭ la putra eduka sistemo kaj la regado de usonaj kaj japanaj reakciuloj. Tiu grandskala, potenca studenta movado akiris vastan subtenon de la laboristoj, kamparanoj kaj popolanoj el aliaj socitavoloj. La fajro de la batalo fariĝas ĉiam pli forta kaj ĝia skalo ĉiam pli granda; ĝi donas fortan baton al la usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj al ilia lakeo — la reviziisma kliko de Mijamoto de la Japana Komunista Partio, montris novan vekigon kaj la grandan potencon de la japana popolo en unuiĝo por batalo kaj forte antaŭenpuŝas la kontraŭusonon, patriotan batalon de la japana popolo.

Tiu ĉi batalo, kiu skuas la insularon de Japanio, estis komencita de la progresema studentoj de Tokia Universitato. En la komenco de la nova jaro, la studentoj de Tokia Universitato, kiuj persistis en la batalo kontraŭ la putra burĝara eduka sistemo jam ĉirkaŭ unu jaron, firme gardis

Jasuda-aŭditorion, nome ĉefsidejon de la studentoj de Tokia Universitato, kaj aliajn punktojn, kiujn ili okupis, por decideme konduki ĝis la fino la batalon kontraŭ la reakciaj aŭtoritatoj de la universitato. La reakcia Sato-registaro morte timis kaj malamis la justan batalon de la progresema studentoj kaj eĉ uzis la barbaran rimedon de armita subpremo. Post kiam la 3,000 plene armitaj policanoj kaj civile vestitaj spionoj, kiujn la reakcia Sato-registaro senskrupule elsendis en la vespero de la 9-a de januaro por entrudiĝi en la Tokian Universitaton por subpremi la studentan movadon, estis repuŝitaj de la progresema studentoj per heroa batalo, ĝi denove sendis en la 18-a de januaro 10,000 plene armitajn policanojn, kelkdek kirasaŭtojn kaj kelkajn helikopterojn por fari alian barbaran subpremon al la progresema studentoj de tiu universitato. Fronte al la faŝisma perfortaĵo de la reakcia Sato-registaro la studentoj pendigis la portreton de Prezidanto Maŭ alte sur la supro de la pordego de la universitato, starigis sur la tegmento de la granda domo ruĝan flagon kun la vortoj “Vivu la penso de Maŭ Zedong!”, skribis per lako sur la kolonoj de la pordego la sloganon “Estas



Japanaj progresemaj studentoj kunvenas en la Centra Universitato de Tokio kaj jure esprimis sian decidemon rebati la frenezan subpremadon fare de la reakcia Sato-registaro kaj konduki ĝisfine la batalon por frakasi la putran burĝaran eduksistemon por universitatoj.

Japanaj progresemaj studentoj persistas en sia justa batalado kontraŭ la faŝismaj reakciaj policianoj.



prave ribeli” kaj faris heroan lukton kontraŭ la reakciaj policianoj. Tiuj ĵetis, unuflanke, larmigajn bombojn de sur helikopteroj super la domo okupita de la studentoj kaj aliflanke atakis la studentojn per akvoŝprucigiloj kaj larmigaj bomboj surtere. Per ŝtonoj kaj bruligaj boteloj, la studentoj rebatis la kirasaŭtojn kaj policianojn, kiuj venis proksime kontraŭ ili, kaj fojo post fojo repuŝis la atakojn de la malamikoj. La batalo daŭris kvardek horojn, kaj nur je la 3-a horo posttagmeze de la 19-a la reakciaj policianoj sukcesis entrudiĝi en Jasuda-aŭditorion — la lastan batalpozicion okupitan de la progresemaĵ studentoj. La policianoj barbare arestis ĉirkaŭ 300 studentojn, kiuj heroe persistis en la batalo.

La revolucia spirito de la heroe batalantaj progresemaĵ studentoj de la Tokia Universitato forte kuraĝigis la justan batalon de la progresemaĵ studentoj de aliaj universitatoj en Japanio. Ekde januaro la progresemaĵ studentoj de dekoj da universitatoj inkluzive de la Japana Universitato en Tokio, Centra Unviersitato, Tokia Universitato de Fremdaj Lingvoj, Tokia Universitato de Edu-

kado kaj Meiji-universitato en Tokio, Kiota Universitato kaj Ricumeikan-universitato en Kansai kaj Nagasaka Universitato en Kjuŝu, leviĝis unuj post aliaj kaj disvolvis batalon kontraŭ la putra burĝara eduka sistemo kaj kontraŭ la barbara subpremado fare de la reakcia Sato-registaro. La progresemaĵ studentoj de la Kiota Universitato kaj aliaj universitatoj en Kansai montris same heroan, obstinan kaj sentiman revolucionan spiriton en sia batalo. Ĉe la vespero de la 1-a de marto, la Sato-registaro sendis polican trupon el 2,000 personoj, kiuj entrudiĝis en la Kiotan Universitaton kun kirasaŭtoj kiel avangardo, por subpremi la progresemaĵ studentojn, kiuj persistis en batalo. Tiam la progresemaĵ studentoj de la Kiota Universitato kaj aliaj universitatoj en Kansai kun kaskoj sur siaj kapoj heroe repuŝis la atakon de la policianoj per bastonoj kaj ŝtonoj. Post akra batalo daŭranta ĉirkaŭ du horojn kaj duonon ili forpelis la policianojn kaj denove superregis la tutan universitaton.

En la krima agado de la reakcia Sato-registaro en barbara subpremo al la studenta movado de Japanio, la reviziisma renegata Mijamoto-kliko

Manifestaciantaj studentoj sentime luktas brave kontraŭ la armitaj policianoj alsenditaj de la reakcia Sato-registaro por subpremado.



de la Japana Komunista Partio fariĝis ĝia fidela lakeo kaj komplico. Mijamoto Kenĵi, la ĉefo de tiu renegata kliko, eĉ kalumniis la progresemajn studentojn, kiuj persistis en la justa batalo, kiel trockistojn kaj postulis, ke la reakciaj aŭtoritatoj de la universitatoj alprenu "firman" paŝon kontraŭ ili. La reviziistoj de la Japana Komunista Partio kaj la dekstraj studentoj kune okupis konstruaĵojn de universitatoj kaj kunlaboris kun la reakciaj policianoj por fari atakojn kontraŭ la progresemajn studentoj. Kun la malnobla celo diserigi kaj subfosi la studentan movadon la renegata Mijamoto-kliko postulis, ke la progresemajn studentoj praktiku la tiel nomatan "leĝismon", "teni bonan ordon" kaj "agi laŭ reguloj kaj decaj manieroj" kaj provis fari la intrigon de "intertraktado" kun la reakciaj aŭtoritatoj de la universitatoj. Sed la japanaj progresemajn studentoj tute neglektis tion, por kio pledeas tiu renegata kliko, kaj frakasis, fojo post fojo, per siaj batalaj agadoj la diversajn intrigojn de tiu renegata kliko malhelpanta la studentan movadon. Je la 6-a kaj 7-a de februaro ĉi-jare, 8,000 studentoj de la Tokia Universitato kaj la progresemajn studentoj de la Tokia Fakultato por Ĝenerala Edukado okazigis en tiu fakultato Kunvenon por Pridemandi la Respondecon por protesti kontraŭ la krimoj de Iĉiro Kato, aganta rektoro de la Tokia Universitato kaj Ĵiro Tamura, dekano de la menciita fakultato, kiuj fariĝis lakeoj de la Sato-registaro kaj komplotis kun la reakciaj policianoj por subpremi la studentan movadon. Vizaĝe al la batalo de la progresemajn studentoj Ĵiro Tamura estis devigita subskribi konfeson pri siaj krimoj. En la 10-a, la progresemajn studentoj okazigis en tiu fakultato kunvenon de studentaj reprezentantoj kaj frakasis la intrigon de la reviziisma renegata Mijamoto-kliko rilate al la tiel nomata "decido" pri "ĉesigo de striko kaj forigo de barikadoj". Ili ree konstruis fortikajn barikadojn ĉe la pordego kaj antaŭ la domo de la fakultato por decideme daŭrigi la strikon kaj denove ĉirkaŭfermi la fakultaton.

La justa batalo de la progresemajn studentoj de Japanio rekte donas baton al la putra burĝara eduka sistemo. En la Kiota Universitato, la reakciaj aŭtoritatoj kaj la renegata Mijamoto-kliko planis okazigi en la 3-a de marto eniran ekzamenon celante defendi la reakcian edukan sistemon. Ili antaŭtempe sendis la gardistojn de la universitato kaj la sekvantojn de la renegata Mijamoto-kliko okupi la ĉefan domon de la universitato kaj preni la tutan universitaton sub sia kontrolo. Sed la progresemajn studentoj rapide travidis ilian hontindan intrigon. En la

nokto de la 26-a de februaro, ĉirkaŭ 400 progresemajn studentoj sturmis en la ĉefan domon de la universitato, spite venton kaj neĝon, forpelis la gardistojn de la universitato kaj la sekvantojn de la renegata Mijamoto-kliko, okupis tiun domon kaj hisis super ĝia tegmento freŝe ruĝan flagon. Sub la firma batalo de la progresemajn studentoj, la reakcia aŭtoritato de la universitato estis devigita deklari en la antaŭtagmezo de la 27-a: "Nun estas ne eble okazigi eniran ekzamenon en la universitato." En la 14-a de februaro la progresemajn studentoj de Ricumeikan-universitato en Kansai kaj Kansai-a Instituto en Niŝinomija disvolvis grandan batalon kontraŭ la eniraj ekzamanoj de novaj studentoj planitaj respektive de la aŭtoritatoj de la nomitaj universitato kaj instituto en kunlaboro kun la renegata Mijamoto-kliko por defendi la putran burĝaran edukan sistemon. Antaŭ la forta studenta movado, ĉiuj intrigoj kovitaj de la reakcia Sato-registaro en komploto kun la reviziisma renegata Mijamoto-kliko bankrotis unu post alia.

La progresema studenta movado en Japanio progresas ruliĝante antaŭen kun ondoj unuj pli altaj ol aliaj, kaj la lancpinto de la disvolviĝanta batalo estas tuŝita de la putra burĝara eduka sistemo rekte al la reakcia regado de la usona imperiismo kaj la pro-usona japana monopola kapitalo. En la bataloj kontraŭ la "sekureca traktato" inter Japanio kaj Usono, kontraŭ la militaj bazoj de la usona armeo kaj kontraŭ entrudiĝoj de usonaj nukleaj ŝipoj en japanajn havenojn, la progresemajn studentoj ĉiam staras en la unuaj vicoj kaj faras sturmojn kun granda heroeco. En la komenco de la pasinta vintro, ili ensturmis en "Defendan Agentejon", kiu estas grava konsistiga parto de la ŝtata maŝino de la japana burĝaro, detruis la telefonan ĉambron, kiu interligiĝas kun la militaj bazoj kaj gluis sur la murojn kontraŭusonajn sloganojn. En la 3-a de februaro ili ensturmis en la usonan ambasadorejon en Japanio, starigis ruĝan flagon sur la tegmento de ĝia domo kaj laŭte kriis la batal-sloganon "For la usonan imperiismon!" dronigante la malamikojn en grandan panikon.

La arda justa batalo de la progresemajn studentoj de Japanio akiris vastan kaj fortan subtenon de la japanaj laboristoj, kamparanoj kaj popoloj el aliaj soci-tavoloj. Tiuj senĉese okazigis kunvenojn kaj manifestaciojn por protesti kontraŭ la krimaj agoj de la reakcia Sato-registaro kaj la renegata Mijamoto-kliko, kiuj barbare subpremis la studentan movadon. En la 15-a de januaro kaj la 11-a

de februaro, laboristoj, kamparanoj, urbanoj kaj studentoj el Tokio, Hokkaido, Kjuŝu, Jokohamo, k.a. lokoj okazigis dufoje en Tokio dekmil-personan kunvenon por ĵuri firman subtenon al la japanaj progresemaĵoj studentoj por konduki la justan batalon ĝis la fino. La laboristoj, kamparanoj kaj popolamasoj unuiĝis kun la progresemaĵoj studentoj kaj batalis ŝultro ĉe ŝultro por rebati la barbaran subpremon fare de la reakciaj policianoj de Sato. Ĉirkaŭ vespero de la 1-a de marto, kiam la reakcia polica trupo de Sato el 2,000 personoj entrudiĝis en la Kiotan Universitaton por subpremi la progresemaĵojn studentojn, multaj laboristoj sturmis al la ĉirkaŭo de la universitato por subteni la batalon de la studentoj. De la deka horo vespere, en firma unuiĝo la laboristoj kaj la studentoj iris al la stratoj apud la universitato kaj konstruis barikadojn per aŭtomobiloj, tabloj kaj ŝrankoj por rebati la atakon de la reakciaj policianoj. Ili starigis ruĝajn flagojn sur la barikadoj, kaj malantaŭ la barikadoj, ili manifestaciis kun alta batalvolo. Tiu batalo daŭris ĝis la sesa matene de la 2-a de marto kaj fine devigis la reakciajn policianojn retiriĝi.

Por ke la progresema studenta movado de Japanio pli bone interligiĝu kun la laborista movado kaj la kamparana movado, multaj junaj japanaj studentoj, post studo de la brila verko de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ *La Direkto de la Junula Movado*, konscie iris profunde inter la laboristajn kaj kamparanajn amasojn. En Sanrizuka de Ĉiba-gubernio, kie oni de longtempe persistas en la batalo kontraŭ la konstruado de la nova Tokia Internacia Aerodromo fare de la usonaj kaj japanaj reakciuloj, la junaj studentoj propagandis marksism-leninismojn kaj la penson de Maŭ Zedong al la kamparanoj kaj samtempe ili kune manĝis, loĝis, laboris kaj batalis kun la kamparanoj. En tiuj tagoj de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj la politika konscio de la studentoj rapide plialtiĝis.

La paŝo-post-paŝa interligiĝo de la laborista movado, la kamparana movado kaj la studenta movado de Japanio kaj formiĝo de forta kontraŭ-usona patriota unueca fronto certe puŝos plie la kontraŭuson, patriotan batalon de la japana popolo al nova alta tajdo, kaj ĝi certe batalakiroso novan, pli brilan venkon.

Pli Malfacila Provizado en Viando de Sovetunia Reviziismo

LA plenampleksa restaŭro de kapitalismo fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko en la lando alportis seriozan malbonan rezulton al la brutbredado de Sovetunio, dronigante ĝin en plenan ĥaoson, tiel ke fariĝas ĉiam pli malfacila la provizado de brutproduktaĵoj, precipe de viando.

Dum la lastaj ses jaroj la totala nombro de brutoj malgrandiĝis per ĉirkaŭ 14,000,000 kapoj en la tuta reviziisma Sovetunio.

Kiel unu el la gravaj fontoj de provizado de viando en Sovetunio precipe la porkobredado serioze malkreskis. En januaro de 1968, la totala

nombro de bredataj porkoj en Sovetunio reduktiĝis per 7,100,000 kapoj kompare kun tiu en januaro de 1967; kaj en januaro de la kuranta jaro tiu nombro plie reduktiĝis per 1,900,000 kompare kun tiu en januaro de 1968. La totala nombro de bovoj en la pasinta jaro estis je 1,500,000 malpli granda ol tiu de la antaŭirinta jaro, inkluzive la malpliigon de 400,000 laktobovinoj. Dum la lastaj ses jaroj la totala nombro de ŝafoj malpliĝis je 300,000 kapoj. En multaj gravaj brutbredaj regionoj regas plena malprospereco.

La grandskala retroirado fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko en la produktaj rilatoj ne nur pli kaj pli reduktis la nombrojn de bredataj brutoj, sed ankaŭ senĉese malaltigis la kvanton kaj kvaliton de brutproduktaĵoj. En januaro de 1969 la ĵurnalo *Pravda* de la sovetunia reviziismo malkaŝis pri tio, ke en iuj regionoj de RSFSR, Ukrainio kaj Kazahio, kie koncentriĝas pli ol 80% de la totala produkto de viando en Sovetunio, "aparte malpliĝis la produkto de porkaĵo en la pasinta jaro". Ekde la kuranta jaro la viandprodukto pliapaŝe malaltiĝis. La videble reduktita statistiko publikigita de la sovetunia reviziismo mem montras, ke en januaro de la kuranta jaro la kvanto de viandprodukto estis je 7%, t. e. je ĉirkaŭ 50,000 tunoj malpli granda ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Pro la serioza malkresko de brutbreda produktado ekstreme mankas nun viando en la merkato de Sovetunio. En multaj lokoj, inkluzive de la plej grandaj vendejoj de manĝaĵoj en la ĉefurboj de iuj respublikoj oni preskaŭ ne povas trovi porkaĵon, kokaĵon kaj anasaĵon. Eĉ en Moskvo oni povas malfacile trovi freŝan viandon en la "ŝtataj" vendejoj. En la artikolo titolita "Bifstekoj en Kurta Cirkvito" publikigita en la ĵurnalo *Soveta Rusio* estas malkaŝite, ke en la urbo Tula iu kliento, kiu volis aĉeti bovaĵon por friti bifstekon, iris al la vendejo n-ro 32, sed tie troviĝis "nek porkaĵo nek bovaĵo", kaj la vendisto diris: "Jam tri tagojn oni ne alportis." "Malplenaj" estis la vendtabloj de viando en vendejoj n-ro 55 kaj n-ro 69. Vole nevole la ĵurnalo *Laboro* de sovetunia reviziismo konfesis, ke en la manĝejoj por laboristoj "ne estas viando". La gazeto *Agrikultura Ekonomio* de la sovetunia reviziismo lamentis pri tio, ke "konsumo de brutproduktaĵoj, precipe de viando, estas ne sufiĉa" en Sovetunio.

Por solvi la malfacilon en provizado de viando en sia lando, Breĵnev, Kosigin kaj similaj eĉ uzas la rimedon buĉi negrasigitajn kaj ne maturiĝintajn brutojn por provizi la bazarojn, en la tempo kiam ili provas trovi helpon el intensigo de disvolvado de privataj mastrumoj. La *Agrikultura Ekonomio* de la sovetunia reviziismo konfesis, ke estas malaltaj la graseco kaj la pezo de vendataj brutoj en Sovetunio. La meznombraj pezoj de bovoj, vendataj aŭ liverataj de diversaj lokoj al la ŝtato varias inter "nur 256 kaj 265 kg.". Alia gazeto de sovetunia reviziismo montris, ke la meznombra pezo de bovoj, venditaj de la Ĝaĝur-a Sovhozo atingis eĉ "nur 149 kg.". La absurda agmaniero de la sovetunia reviziismo nepre detruos plie la brutbredan ekonomion kaj pliseriozigos la haoson en ĝia brutbreda produkto.

Same kiel imperiismaj landoj, kiuj ĉiam plejeble klopodas transigi siajn krizojn al aliaj, la sovetunia reviziisma renegata kliko aplikas la koloniisman politikon senskrupule rabi brutojn el Mongolio por plenigi la mankon de brutproduktaĵoj en sia lando. La videble malgrandigitaj ciferoj, publikigitaj de la aŭtoritatuloj de Mongolio kaj Sovetunio, montras, ke en 1963 la registaro de Mongolio aĉetis totale 114,000 tunojn da vivaj bovoj kaj ŝafoj, kaj al Sovetunio ĝi eksportis 88,100 tunojn, t. e. 80% de sia totala aĉetita kvanto. Ĉirkaŭ 15,000 vivaj brutoj estas ĉiutage sendataj de Mongolio al viand-prilaborejoj de la sovetunia reviziismo. Por kontentigi la nesatigeblan postuladon de la sovetunia reviziismo la reviziisma kliko de Mongolio eĉ sendis brutidojn kune kun la patrinaj brutoj al buĉejoj de la sovetunia reviziismo.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris al ni: **"La malfaciloj de reakciaj fortoj estas nekonkereblaj, ĉar ili estas fortoj proksimiĝantaj al morto, kiuj ne havas perspektivon."** Ĝuste tia ja estas la stato de la sovetunia reviziisma renegata kliko. Pere de la faktoj de malprosperiĝo de brutbredado kaj plena haoso en la aliaj ekonomiaj branĉoj, la popolo de Sovetunio pli klare vidas, ke la ĉefa krimulo de la serioza detruigo de la produktaj fortoj de Sovetunio estas la sovetunia reviziisma renegata kliko. Por ke la produktaj fortoj de Sovetunio revenu al la vojo de rapida disvolviĝo kaj ke ĝi resuriru la brilan vojon de socialismo necesas balai tiun ĉi bandon da perfiduloj en la rubujon de historio.



Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekinopera Trupo

SCENO 7

FORKAŜI LA SEKRETON TRA LA TERLITO

Mateno post kelkaj tagoj.

La domo de Li Juhe.

La kurteno leviĝas en muziko. Apud la elektrostango ne-malproksime de la pordo sidas spiono alivestita kiel botisto, kiu intence forte batas plan-dumon, gvatante la domon de Li Juhe.

Tiemej eliras de post la terlita kurteno. Post la kurteno estas terlito, de kiu ŝi estas sin levinta.

Tiemej: *Post kiam paĉjo arestiĝis sen reveno,*

Avino: *Nin mordas maltrankvilo kaj ĉagreno.*

Tranĉil-akrigisto (*interne*): Tondilojn kaj tranĉilojn akriĝu?

Tiemej: Aŭskultu, avinjo!

Avino: Ho, tranĉil-akrigisto

Envenas la tranĉil-akrigisto.

Tranĉil-akrigisto: Tondilojn (*iras al la fenestro kaj vidas la papilian signon. Li hezitas, kaj poste kapjesas kaj daŭrigas sian kriadon*) kaj tranĉilojn akriĝu!

La avino tiras Tiemej al la fenestro kaj rigardas eksteren.

Botisto: En la povra strateto ne estas negoco por vi. Kial do vi kriaĉas tie ĉi? For!

Tranĉil-akrigisto (*kviete*): Frato! (*Intence laŭte*) Zorgu aferon vian, kaj mi la mian. Ni tranĉil-akrigistoj ja devas kriegi. Se vi ne permesas min kriegi, kiu do petos mian servon?

Botisto: Frue foriru, alie, vi rikoltos ĝenon!

Tranĉil-akrigisto: Bone, bone, mi tuj ekiros! Mi serĉos klientojn aliloke! (*Irante li levigas sian manon al la orelo kaj krias denove.*) Tondilojn kaj

tranĉilojn akriĝu! (*Li foriras.*)

Avino (*tiras al si Tiemej*): Ĉu vi aŭdis, Tiemej? La tranĉil-akrigisto venas eble por kontakti kun ni, kaj li foriris vidinte la signon.

Tiemej: Mi iru kun la ĉifrolibro kaj ruĝa lanterno por serĉi lin, kaj esplori ĉu li estas nia homo aŭ ne.

Avino: Tion ne faru. Estas hundaĉo ekstere, vi ne povas eliri!

Tiemej: Ho, kiel do mi povas eliri?

Mi volas serĉi strate l' akrigiston de tranĉiloj.

Sed nun elir' ne eblas, min turmentas maltrankvilo.

Ho, kiel bone estus, se mi havus du flugilojn!

Avino, mi jam havas ideon!

Avino: Tuj diru!

Tiemej: *En malespero, mi eltrovis tamen vojon por eliro.*

Avino: Kian vojon, tuj diru.

Tiemej: Rigardu, avino — (*montrante la terliton*) Estas nur muro inter nia terlito kaj tiu de Liu-familio. Mi povas truigi la muron kaj trarampi!

Avino (*tre ĝojiĝas*): Bona ideo. Ni petu Liu-familion helpi nin, oni nepre tenu la sekreton!

Tiemej iras post la kurtenon kaj breĉas la terliton.

Avino: Mi tranĉadu brasikon por kovri ŝian bruon.

Tamtamado *Giuĉujban*. La avino tranĉadas brasikon por kovri la bruon de breĉado de la terlito.

Tiemej (*venas el post la kurteno*): Jam breĉita, avino.

Avino (*prenas la ĉifrolibron el fendo de murkolono, donas la ruĝan lanternon al Tiemej. Serioze*): Tiemej! Zorge identigu la homon kaj ĝuste kontrolu la signalvortojn. Lasu al vi neniom da neglektemo.



Botisto: Kie do estas mia malsano?

Avino: Ĝi troviĝas en viaj ostoj, kiuj jam ŝimas.

Botisto: Ne gravas ke ili ŝimas, ili estos resanigitaj nur post sunumado.

Avino: Vi ja ne povas elteni sunumon. Viaj ostoj jam putriĝis.

Botisto: La homaj ostoj ja devas putriĝi ĉu frue aŭ malfrue, do lasu ilin putriĝi. Diru al via knabino ke ŝi ellitiĝu kaj iom sidu, avino, ne bone estas ke ŝi ĉiam kuŝas. (*Li provas levi la kurtenon.*)

Avino: Kion vi volas fari? Knabino kuŝas sur la lito, kaj vi plurfoje volas proksimiĝi al ŝi, do kian fiintencon vi havas! Foriru, foriru!

Botisto: Bone, mi iros, sed vi atendu min! (*Li foriras kolere kaj geste alvokas al malproksimo.*)

Envenas du spionoj. La botisto frustras kun ili. La avino estas fermanta la pordon.

Avino: Hundaĉo! (*La du spionoj puŝmalfermas la pordon kaj eniras.*) Kio vi estas?

Spiono: Kontrolistoj pri loĝantaro. Kiom da homoj estas en via familio?

Avino: Tri.

Spiono: Kie estas via filo?

Avino: Vi scias kie mia filo nun estas.

Spiono: Kaj kie estas via nepino?

Avino: Ŝi malsaniĝis.

Spiono: Kie ŝi estas?

Avino: Ŝi kuŝas sur la lito.

Spiono: Flanken! Ni ŝin rigardu!

Avino: La knabino malsaniĝis, lasu ŝin iom ripozi.

La spionoj forpuŝas la avinon, kaj volas levi la kurtenon

—Voĉo interne de la kurteno: “Kiuj estas, avino?”

Avino: Kontrolistoj pri loĝantaro!

La spionoj rigardas unu la alian kaj iras el la domo. La avino fermas la pordon.

Spiono (*al la botisto*): Kia ekscitiĝo pro nenio! Ŝi ja kuŝas sur la lito! (*Ili foriras.*)

Botisto: Ha, la aĉa maljunulino intence ŝercas per mi!

Avino: Kiel danĝere! Tiemej!

Gujlan eliras de post la kurteno.

Avino: Ho! Estas vi, Gujlan? Kiel vi venis, knabino?

Gujlan (*kaptas la manon de la avino*): Avino Li!

Tiemej: Trankviliĝu, avinjo. (*Ŝi iras post la kurtenon kaj foriras.*)

Botisto (*krias ekstere*): Malfermu la pordon!

Avino: Kiu?

Botisto: Mi, la botisto.

Avino: Atendu, mi ĝin malfermos. (*Ŝi malfermas la pordon, kaj la botisto eniras.*)

Botisto (*vidante la tranĉilon en ŝia mano*): Kion vi faras?

Avino: Mi tranĉas brasikon! Kion vi volas?

Botisto: Alumeton.

Avino: Sur la tablo.

Botisto: Kiom da membroj havas via familio, maljuna avino?

Avino: Vi ĉiam kaŭras ĉe la pordo de nia domo, ĉu vi ankoraŭ ne scias ĉion pri nia familio? Foriris unu, hejme restas ankoraŭ du.

Botisto: Kie estas la knabino?

Avino: Ŝi malsaniĝis!

Botisto: Malsaniĝis? Kie do ŝi estas?

Avino: Ŝi kuŝas sur la terlito.

Botisto: Sur la terlito? (*Tion dirante li proksimiĝas al la lito.*)

Avino (*baras al li la vojon*): La knabino malsaniĝis, ne timigu ŝin!

Botisto (*rikanante*): Malsaniĝinte, kial ŝi ne ĝemas?

Avino: Nia knabino neniam ĝemas en malsano.

Botisto: Ho, eble via koro troviĝas en malsano?!

Avino: Mi, mi trovas ke ĝuste vi estas en malsano!

*Sekure Tiemej jam foriris tra la domo nia,
Por trankviligi vin bopatrino mia min alsendis.
Ĉar vin atakis la spionoj je alveno mia,
Por trompi l' malamikojn mi sur-lite min etendis.
Denove tra la domo nia Tiemej pasos je reveno,
Kaj mi ŝin ŝirmos. Do ne turmentiĝu de ĉagreno.*

Avino: Vi ja nin elsavis!

Tiemej (*envenas depost la kurteno*): Avinjo! Fratino Gujlan!

Gujlan: Fine vi revenas, Tiemej! Vi morte maltrankviligis vian avinon.

Avino: Se ne estus la helpo de Gujlan, nin trafus katastrofo.

Tiemej: Dankon al vi, Gujlan, ke vi donis al ni grandan helpon.

Gujlan: Estas bone ke vi revenis. Nun mi jam devas reiri.

Tiemej: Ankoraŭ iom restu.

Gujlan montras eksteren de la pordo kaj ili komprenas. Gujlan iras post la kurtenon kaj foriras. Tiemej ordigas la litajon sur la terlito kaj fermtiras la kurtenon.

Avino: Ĉu vi trovis la tranĉil-akrigiston, knabino?

Tiemej (*mallaŭte*): Ej! Mi traserĉis plurajn stratojn sed ne trovis lin. Poste mi vizitis majstron Ĝoŭ, sed ankaŭ li ne estis hejme. Tial mi haste revenis pro timo ke la spionoj rimarkos mian foreston.

Avino: Kie estas la ĉifrolibro?

Tiemej: Mi ne reportis ĝin.

Avino: Kio! (*Surprizite*) Ĉu io okazis?

Tiemej: Mi timis ke reporti ĝin povas kaŭzi malfeliĉon, tial mi kaŝis ĝin sub pilieron de la Mallonga Ponto!

Avino: Oh! Jes, pli bone sendanĝere translokigi ĝin ol ĝin teni hejme. Vi faris ĝuste, knabino. (*Ŝi trankviliĝas.*)

Hoŭ Hianpu envenas kun skatolo de kuko. Li okule ordonas la botiston foriri, kaj frapas sur la pordon.

Avino: Kiu frapas?

Hoŭ: Estro Hatojama venas viziti vin.

Avino (*forte kaptas Tiemej*): Knabino, se mi estos arestita, nepre transsendu la libron al majstro Ĝoŭ, kaj poste klopodu suriri la Nordan Monton per ĉiuj rimedoj.

Tiemej: Avino! (*Ŝi ekploras.*)

Avino: Ne ploru. Iru malfermi la pordon.

Tiemej malfermas la pordon. Hatojama envenas en ĉina robo kaj ĉapelo kun irbastono en la mano.

Hatojama (*eniras la domon kaj false komplimentas*): Kiel vi fartas, avino estimata? Mi estas malnova amiko de Li Juhe, sed malofte vizitis vin pro okupateco. (*Li transprenas la kukoskatolon de la mano de Hoŭ Hianpu, signas ke Hoŭ foriru, kaj poste metas la skatolon sur la tablon.*) Hodiaŭ mi speciale alportas al vi donaceton malkaran, kiu ja ne povas montri mian estimon. Ha, ha, ha...

Avino: Ho, ĉu vi estas sinjoro Hatojama?

Hatojama: Ne, ne. Nur Hatojama.

Avino: Ĉu vi permesas al mi iom ordigi mian vestaĵon antaŭ ol iri kun vi!

Hatojama: Ne miskomprenu, avino. Ne por tio mi venas. Sidiĝu, sidiĝu.

La avino ignoras lin, kaj Hatojama mem demetas sian ĉapelon kaj sidiĝas.

Hatojama: Eble vi tre sopiras vian filon, avino?

Avino: Kompreneble, patrino nature sopiras sian filon.

Hatojama: Ne maltrankviliĝu, li baldaŭ revenos sendifekte!

Avino: Do tre bone.

Hatojama: Ej! Kion fari! Tio estis faro laŭ ordono de superuloj! Fakte, ni bone zorgas lin ĉiuflanke!

Avino: Do dankon al vi!

Hatojama: Ne, ne dankinde! Mi aŭdis de Li Juhe, avino, ke li restigis ion ĉe vi?

Avino: Kion?

Hatojama (*ŝajne senzorge*): Ĉifrolibron.

Avino (*al Tiemej*): Kion li diris, knabino?

Hatojama: Ĉifrolibron!

Tiemej: Ho, jes, (*intence*) tion mi scias. Hieraŭ, kiam mia patro revenis, li tion metis en la skatolon. Li diris, ke tio estas tre.... tre....

Hatojama: Tre grava ĉifrolibro!

Tiemej: Ne! Tre akra zingibro.

Hatojama: Ha, kien vi vin miskondukas, tio kion mi volas, estas libro!

Avino: Libro! Sinjoro Hatojama, mia filo ne scipovas legi, mia nepino neniam vizitis lernejon, kaj ankaŭ mi estas tute analfabeta, nia familio neniam elspezis monon por tio!

Hatojama: Nu, lasu, avino, Li Juhe jam klare tion diris al ni, ĉu vi ankoraŭ povus ĝin kaŝi?

Avino: Se li jam diris al vi, kial vi ne lasas lin reveni por serĉi? Ĉu tiel ne estus pli simple?

Hatojama (*flanken*): Ha! Ankaŭ tiu ĉi maljunulinaĉo estas malfacile traktebla. (*Al la avino*) Sufiĉe jam! Ni ne babilaĉu, sed marĉandu. Se vi donos al mi la libron, do Li Juhe povos

tuj reveni. Se li volos oficon, mi instalos lin vic-sekciestro. Se li volos monon, li ricevos kvinmil juanojn! (*Li elpoŝigas amason da mono.*)

Avino: Kvinmil juanojn kaj ankaŭ la oficon de vic-sekciestro? Kia libro tiom valoras!

Hatojama: Popola diro: varon vendu al homo kiu scias ĝian valoron!

Avino: Se vi tiom ŝatas tiun libron, mi do serĉu ĝin por vi.

La avino tiras Tiemej post la kurtenon.

Hatojama (*kun espero rigardas ilin kaj murmuras al si*): Bone, bone, jen fine mono estas ĉiopova!

Kun pakajo la avino kaj Tiemej alproksimiĝas al Hatojama kaj donas al li iun libron.

volas forĵeti la libron sed li haltas kaj diras al si): Mi ĝin kunportos por esploro. (*Al la avino*) Nun, eble via koro tre maltrankvilas, avino. Estus bone, ke vi iru vidi vian filon kaj demandi al li pri la libro. Ni certe trovos ĝin. Ne necesas hasti kaj rapidi.

Avino: Dankon al vi. (*Al Tiemej*) Bone zorgu pri la domo.

Hatojama: Ne, ankaŭ la knabino iru kune por vidi sian patron.

Avino (*surprizite*): Sed ŝi estas nur infano!

Hatojama (*mansvingante*): Infano! Hm! Kuniru.

Tiemej: Bone, mi iru. Mi ĝuste volas vidi mian paĉjon.

Hatojama: Jes! Knabino, vi devas zorgi pri via patro!

Tiemej: Tion mi komprenas!

Hatojama: Bone, se vi komprenas.

Envenas Hoŭ Hianpu.

Hatojama: Hoŭ Hianpu, bone zorgu ilin. (*Li prenas sian ĉapelon kaj monon kaj iras el la domo kun minaco. Al la eksteraj spionoj*) Gardu por ili la domon! (*Li foriras.*)

Hoŭ (*rikanante al la avino kaj Tiemej*): Ekiru! (*Li iras el la domo kun la skatolo de kuko en sia mano.*)

La avino kaj Tiemej kune forlasas la domon. La spionoj sigelas la pordon.

Tiemej (*vidinte la sigelitan pordon indigne rigardas la spionojn kaj krias*): Avino!

Avino (*brako en brako kun Tiemej*): Iru!

Ekblovo de ventego.

— La kurteno falas.

(*Daŭrigota*)

Avino: Sinjoro Hatojama, jen estas la libro kiun mia filo alportis.

Hatojama (*tre ĝojas pro la neatendita sukceso*): Jes! Ĝuste ĝi, ĝuste ĝi!

La avino donas al li almanakon.

Hatojama (*ricevinte la almanakon koleriĝas furioze*): Ha?! Almanako? (*Kun nesubpremebla kolero li*

☆

☆

☆

毛主席的好战士雷锋

Máo Zhǔxí de Hǎo Zhànshì Léi Fēng

Maŭ-Prezidanto de Bona Batalanto Lej Feng

雷锋是毛主席的好战士，
Léi Fēng shì Máo zhǔxí de hǎo zhànshì,
Lej Feng estis Maŭ-prezidanto de bona batalanto,

中国。”说 完就走了。
Zhōngguó.” Shuō wán jiù zǒu le.
Ĉinio.” Dirinte fin-, (li) tuj foriris.

他听毛主席的话，全心
tā tīng Máo zhǔxí de huà, quánxīn
li aŭskultis Maŭ-prezidanto de vortojn, tutkore

TRADUKO

La Bona Batalanto de Prezidanto Maŭ Lej Feng

全意为人民服务。
quányì wéi rénmin fúwù.
tutanime al popolo servis.

Lej Feng estis bona batalanto de Prezidanto Maŭ; li aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj tutkore kaj tutanime servis al la popolo.

一天，一个老大娘去部队
Yītiān, yīge lǎodàniáng qù bùduì
Iutage, iu maljuna onklino iris (al) armeo (por)

Iutage, iu maljuna onklino iris al armeo por viziti sian filon. En la fervoja stacio, ŝi perdis sian trajnan bileton kaj estis tre maltrankvila.

看儿子。在火车站，她把车票丢了，
kàn érzi. Zài huǒchēzhàn, tā bǎ chēpiào diū le,
vidi filon. En trajn-stacio, ŝi trajn-bileton perdis,

Eksciinte pri tio, Lej Feng tuj aĉetis per sia mono trajnan bileton kaj akompanis la maljunan onklinon en la trajnon.

很着急。
hěn zhāojí.
tre maltrankviliĝis.

雷锋知道了，就马上拿出自己的
Léi Fēng zhīdào le, jiù mǎshàng náchū zìjǐ de
Lej Feng eksciis, tuj elprenis sian

La maljuna onklino demandis: “Kamarado, kiel vi nomiĝas? Kie vi loĝas?” Lej Feng diris ridante: “Mi nomiĝas liberiga armeano kaj loĝas en Ĉinio.” Dirinte tion, li tuj foriris.

钱，买了车票，送老大娘
qián, mǎi le chēpiào, sòng lǎodàniáng
monon, aĉetis trajn-bileton, akompanis (la) maljunan onklinon

KLARIGOJ

上了火车。
shàng le huǒchē.
suriri trajnon.

1. En la han-a lingvo la kategorio de vortoj ĝenerale ne estas signita en ilia formo, nek la akuzativo kaj pluralo. 一天 yītiān same taŭgas por esprimi *iutage, iun tagon, unu tago* aŭ *unu tagon*.

老大娘问：“同志，你
Lǎodàniáng wèn: “Tóngzhì, nǐ
Maljuna onklino demandis: “Kamarado, vi

2. Rekta objekto de verbo ĝenerale staras tuj post ĝi. Ĉe okazo de inversigo de tiu ordo necesas aldono de konvena vorto, ekzemple 把 en la frazo 他把车票丢了 tā bǎ chēpiào diū le. Sen 把, tiu frazo devus legiĝi: 他丢了车票 Tā diū le chēpiào.

叫什么名字? 住在哪里?” 雷锋
jiào shéme míngzì? zhù zài nǎr?” Léi Fēng
nomiĝas kia nomo? Loĝas en kie?” Lej Feng

3. En iuj kazoj, oni uzas difinan artikolon en Esperanto, sed en la ĉina ĝi tamen mankas, ekzemple antaŭ la lastaj du 老大娘 lǎodàniáng en la teksto. Nur en tre necesa okazo oni aldonas precizigan epiteton.

笑着说: 我叫解放军, 住在
xiàozhe shuō: “Wǒ jiào jiěfàngjūn, zhù zài
ridante diris: “Mi nomiĝas liberiga armeano, loĝas en

La Unuafoja Pilotado

ANTAŬNELONGE, nova aviadisto Ĝaŭ Gang, kiu ĵus plenumis aviadan trejnadon de ok monatoj, ricevis la gloran kaj malfacilan taskon de unuafoja pilotado.

Muĝas la vento kaj bruegas la tondro, alruliĝas la nuboj kaj flugas la steloj. Arĝenta batala aglo fluge ekleviĝas kaj kun muĝado sturmas al la blua ĉielo kaj flugas al la fronto de batalo!

En la kajuto de la aviadilo Ĝaŭ Gang streĉe kaj aplombe persistas en la batalposteno. Proksime post li sidas instruisto de pilotado Ĝoŭ Bin. Rigardante tiun ĉi novan batalanton kiu unuafoje flugas al la ĉielo, Ĝoŭ Bin pleniĝis de ĝojo en la koro. Jen vidu, kiel serioze kaj lerte li observas la celojn sur la tero kaj kiel rapide kaj atente li parkere kalkulas la konstataĵon. Ho, kvazaŭ veterana piloto li simple estus!

Fluge forpasis la tempo. Antaŭ ok monatoj, post kiam tiuj junaj revoluciaj sturmantoj harditaj en la granda proletara kultura revolucio venis en aertrupon, ili ekdisputis: “Kiom da lernotempo ni bezonas por flugi al la ĉielo?” “Tri jarojn!” La vicleplena Ĝaŭ Gang svingis la pugnon kaj diris: “Por defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ ni ne povas atendi eĉ unu tagon kaj por komplete forbalai fiinsektojn ni ne povas prokrasti eĉ unu minuton! Tri jarojn? Tio ja ne estas flugo sed simple rampo!” “Prave!” emocie interrompis Ĝoŭ Bin, kiu ĉiam aŭskultis ilian interparolon, kaj diris: “Kamaradoj, la granda renegato Liu Ŝaŭki, Pen Dehuaj kaj Luo Ĵujking ja provis nin kateni per rutinoj de fremduloj por ke ni ne povu plej rapide flugi al la ĉielo. Kaj nun la ruliĝanta torento de la granda kultura revolucio jam frakasis ĉiujn barajojn!” Ĝaŭ Gang antaŭenpaŝis unu paŝon, firme manpremis al Ĝoŭ Bin kaj plengorĝe diris: “Kamarado instruisto, ni estas batalantoj fidelaj al Prezidanto Maŭ. Al diabloj tiuj fremdlandaj rutinoj! Eĉ se la ĉielo je kvardek mil kilometroj altus, ni ja povos ĝin ascendi per unu paŝo kun la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!” Ĝoŭ Bin kun ĝojo

levis la ruĝan trezoran libreton dirante: “Prezidanto Maŭ instruas al ni **‘la lernotempo devas esti mallongigita, revolucio devas esti farita en edukado’**. Ja prave diris kamarado Ĝaŭ. Kun la instruo de Prezidanto Maŭ vi certe povos flugi al la blua ĉielo en plej mallonga tempo!” Ĝaŭ Gang emociite gvidis ĉiujn kriegajn sloganojn: “For Liu Ŝaŭki!” “Por Prezidanto Maŭ!” “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe!” Kvazaŭ tondro la revoluciaj sloganoj skuis la ĉielon kaj teron. En la sama nokto ili kunvenis por studi la trejnan planon pri efektivigado de la plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ, ellaboritan de la supera institucio kaj sendis la decido-espriman leteron al Prezidanto Maŭ. Hodiaŭ, ili fine realigis sian juron kaj per senprecedenca rapideco flugis al la blua ĉielo!

“Raporton, instruisto, nuboj!” eksonis streĉa voĉo de Ĝaŭ Gang.

Ankaŭ Ĝoŭ Bin trovis nubtavolojn antaŭe. Apenaŭ li volis atentigi Ĝaŭ Gang, la aviadilo jam kun granda rapideco sturmis en la kotonforman nubamason kaj estis ĉirkaŭigita de dikaj nubtavoloj. ĴPor Ĝaŭ Gang tio ja estis granda malfacilo. Ĝoŭ Bin rigardis lin kaj vidis, ke li sin montras iom maltrankvila kun hirtigitaj densaj brovoj kaj fikse rigardas al Ĝoŭ Bin, ŝajne demandante “Kion fari?”

“Kion fari?” ankaŭ la cerbo de Ĝoŭ Bin forte ruliĝas kiel la nubondoj ekster la fenestro. Estis tute permesate, ke li mem pilotu anstataŭ Ĝaŭ Gang tra la nubtavoloj kaj poste tiun denove instruu. Sed kial oni ne povas lasi Ĝaŭ Gang mem trasturmi? Ĉu li ne sturme trapasis malfacilojn unu post la alia sin apogante sur la penso de Maŭ Zedong kaj senlima fideleco al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ en la antaŭa aviado? Hodiaŭ estas kredinde, ke Ĝaŭ Gang certe povos ĝin trapasi! Rigardante la portreton de Prezidanto Maŭ Ĝoŭ Bin decideme diris: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.**”



Letero de Albana Leganto B. M.

Karaj kamaradoj!

Dankon! Vi bonvole sendis al mi la serion de broŝuroj de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj ankaŭ aliajn kvar tre gravajn libretojn.

Mi plezurege studos ilin kaj rekomendos ilin al miaj gestudentoj. Kiel bone estas ke vi tradukis tiujn verkojn de Prezidanto Maŭ! Krom la plenaj verkoj delonge tradukitaj en la albanan lingvon, ni povas nun legi facile en Esperanto multon pri apartaj problemoj de ĉina revolucio.

Bonfarton kaj sukceson al vi!

Letero de Okcident-germana Leganto W. S.

Jes, mi ricevis vian ŝatatan sendaĵon kaj la sondiskon pri la fortepiana muziko "Ruĝa Signal-lanterno" en la januaraj tagoj. Mi ĝojas ke nun la muzikilo "fortepiano" ankaŭ servas al la spirito de la proletaro. La arta linio de Prezidanto Maŭ nun donas por tio novan brilon de la revolucia literaturo. Mi taksas la kantpecojn alte, tre bele.

La lerngrupo volis scikoni pri Ĉinio, ne nur el libroj en nia lando sed legi ankaŭ ĉiun ajn novaĵon pri

ĝi post la Liberigo kiun oni akiris venkinte malfacilojn; kiu ŝanĝigo okazis inter laboristoj kaj kamparanoj...

Ankaŭ mi povis kompreni ĉi tiun diron de Prezidanto Maŭ, ekz. "...ke la plej puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, ke ili estas pli puraj ol la burĝaraj kaj etburĝaraj intelektuloj, malgraŭ ke iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekajojn." Mi opinias ke tio estas fonto de ĉiuj virtoj por la ĉina junularo, ke ili ne estu en la ideologio de la strebado al famo, profito kaj ĉasado pri titoloj, sed servu la popolon.

Mi esperas, ke en la nova jaro Ĉinio akiros novan sperton kaj novajn venkojn en la diversaj sferoj de la superstrukturo...

Letero de Ĉeĥoslovaka Leganto

Viaj ĉiuj artikoloj, rubrikoj, kovriloj, dorskovriloj, koloraj bildoj kaj fotoj en ĉiuj numeroj estas ĉiam bone kaj plej zorgeme preparitaj, tiel mi diras ke ne estas specialaj rimarkoj kaj kritikoj.

Enhavo de ĉiuj artikoloj estis kaj estas vere kaj tempe preparitaj ĉiam en vera taŭga tempo. Daŭrigu plene sur tiu linio!

Pardonu ke mi ne respondis pro niaj naciaj doloroj kiujn preparis al ni tiuj de kiuj ni ne atendis! Honto tutmonda al ili — certe alvenos tagoj por nia venko! Hontu, hontu ili pro tio en la tuta mondo.

Viaj gazetoj, artikoloj precipe pri sentoj al Maŭ Zedong fortigis nin kaj fortigas nin, tio estis vera fonto por nia forteco dum malgaja aŭgusta tempo kaj niaj naciaj doloroj.

Saluton al ĉiuj viaj gesamideanoj!

Feliĉon al viaj laboroj!

Nun ekster la fenestro kvazaŭ estus ne dense ĉirkaŭantaj nuboj sed senlima lazura ĉielo. Iom da nuboj estas netiminda, kaj ne estas nevenkebla malfacilo antaŭ la kompartiano! Muĝante la batala aglo trarompis nubojn kaj fluge sturmas antaŭen!

Malaperis la nubavoloj, kaj prezentiĝis antaŭe la vasta blua ĉielo. Malfaciloj estas venkitaj! Ĝaŭ Gang laŭte kriis kun profunda sento: "Ĉiam fidelu al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!" "Ĉiam fidelu al la ĉiamvenka penso de Maŭ

Zedong!" "Ĉiam fidelu al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!" "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe!" La batala aglo alte flugis en la lazura ĉielo kaj en ĝi ankaŭ eĥis tiu hurao. Sub flugiloj fluge pasis la kamparo en flirtantaj ruĝaj flagoj kaj urboj en fervore ruliĝantaj ondoj. Ja pli pompa kaj grandioza fariĝas nia ruĝa kaj granda patrolando sub la ora sunbrilo. Nun nia sept-cent-miliona popolo antaŭenmarŝas laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kun pli alta rapideco ol la batala aglo por renkonti pli grandan venkon!

Sur la

kovrilo:

La ruĝaj gvardianetoj plej ŝatas studi verkojn de Prezidanto Maŭ.

Sur la

dorskovrilo:

La suno leviĝas ĉe Ŝaŭŝan, kaj ruĝas la oriento je ĝia leviĝo.

Ŝaŭŝan de Hunan-provinco — la hejmloko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (131)1969

Ĉefa Enhavo

Ŝtala Heroo Ĝang Juĉun

Revolucii ĝis la Lasta Spiro

Ĉiama Antaŭenmarŝo

Vera Volo de la Sovetunia Popolo

Ruĝa Floro de Kooperativo

Plantidoj Forte Kreskas sub la Nutrado de Pluvo kaj Roso

Pres-tinktura Fabriko en Pompa Ruĝiĝo

Nova Printempo en Malnova Minejo

Ni Mem Sukcesis Produkti Epiklorohidrinon

Nova Fizionomio de Porcelana Urbo

Notoj Pri la Marĉa Herbejo

Vigle Disvolviĝas Studenta Movado en Japanio

Pli Malfacila Provizado en Viando de Sovetunia Reviziismo

Ruĝa Signal-lanterno (*pekina opero*)

Lecionoj de Ĉina Lingvo

La Unuafoja Pilotado (*rakonto*)

Nova Metiarlo



La du heroaj fratinetoj sur stepo (*brodaĵo*)


Baniĝo en la Brilo de la Penso de Maŭ Zedong

En januaro 1935, sub la persona prezido de Prezidanto Maŭ, la plivastigita kunveno de la Politika Buroo de la Partio kunvokita en Zunji, Gujĝou-provinco, korektis la eraran "maldekstran" linion kaj starigis la ĝustan gvidon de la centra organo de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel ĉefo. La bildo montras: la garnizono de Zunji propagandas plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ antaŭ la sidejo de la nomita kunveno.





Ginggang-montaro estas loko, kie Prezidanto Maŭ persone fondis la unuan revolucion bazlokon en Ĉinio. En la bildo: la malriĉkamparanoj kaj mal-superaĵ mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de Daging-a produkta grupo de Ginggang-montaro studas la "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ antaŭ lia antaŭa loĝejo en Daging.



La komandantoj kaj batalantoj de la "Heroa Oka Roto", kiu venis al Jan-an por plenumi la taskojn de subteno al industrio, agrikulturo kaj maldekstruloj kaj de milita kontrolo kaj milita trejnado, alte tenas la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj marŝas laŭ la revolucia vojo malfermita de Prezidanto Maŭ.



